

3/2020

Majo  
Junio

ISSN 0032-2431

# Pola Esperantisto

## Revuo de Pola Esperanto-Asocio



- ★ Vivo mi amas vin
- ★ 10-jariĝo de „Esperanto-Libraro”
- ★ Mila van der Horst-Kolińska - grava persono...

## **Pola Esperantisto**

Dumonata revuo de Pola Esperanto-Asocio. Fondita en 1908.

## **Eldonanto**

Pola Esperanto-Asocio  
ul. Gen. W. Andersa 37/59 a  
00-159 Warszawa  
<http://www.esperanto.pl>

## **Ĉefredaktoro**

Robert Kamiński, [rk-lodzo@wp.pl](mailto:rk-lodzo@wp.pl)

## **Kunlaboro**

Teresa Nemere, Roman Dobrzyński,  
Jerzy Dryja, Magdalena Tatara,  
Andrzej Sochacki, Adam Wilkus

## **ABONOJ**

La abono por 2020 - por 6 numeroj (papera):

Pollando - 50 zlotoj

eksterlando - 20 euroj

Cifereca (pdf)

Pollando - 25 zlotoj

eksterlando - 10 eŭroj

Pagendaj al la konto:

PL 37 2130 0004 2001 0558 6110 0002

swift INGBPPLPW

La mendon provizu per informo, al kiu  
adreso estu sendata la revuo.

## **ATENTO**

Abonoj per eŭroj validas post  
aldono de bankaj kostoj.

Polan Esperantiston eblas aboni per  
Konto de PEA en UEA: peaa-v.

Detaloj troviĝas ĉe:

<https://uea.org/alighoj/pagmanieroj>

kaj <https://uea.org/alighoj/spagilo>

Presejo

BŁĘKITNE STUDIO

ul. Chopina 6, 44-100 Gliwice

Fronta kovrilpaĝo - Krzysztof Łobacz el Szczecin

## **Estraro de PEA**

Robert Kamiński - prezidanto  
Agnieszka Mozer - vicprezidanto  
Zofia Śmistek - sekretario  
Alina Mozer - kasisto  
Marek Mazurkiewicz - estrarano

## **Ĉefdelegito de UEA**

Stanisław Mandrak:  
[stanislaw.mandrak@gmail.com](mailto:stanislaw.mandrak@gmail.com)

## **Peranto de UEA**

Jan Skonieczka: [jaskon@op.pl](mailto:jaskon@op.pl),

Pri la skribitaj artikoloj  
respondecas  
la aŭtoroj mem.  
Ricevitajn manuskriptojn  
oni ne resendas.  
La redakcio rezervas al si  
la rajton mallongigi  
kaj korekti la tekstojn.  
Represo kaj tradukoj nur  
kun indiko pri la fonto



**Pola Esperanto-Asocio**  
Polski Związek Esperantystów

## Enhavo

|  |    |
|--|----|
| Redaktoraj vortoj .....  | 2  |
| <b>Eventoj</b>   |    |
| <i>Andrzej Jabłoński</i> , Invito al Szczecin .....  | 3  |
| <i>Elżbieta Karbowska</i> , Esperanto kaj UNESKO - Renkontiĝo kun François Lo Jacomo             | 3  |
| <i>Małgorzata Komarnicka</i> , La 8-a Eŭropa Festivalo de E-Kantoj ĉi-jare okazos .....          | 5  |
| <i>Teresa Pomorska</i> , Esperantista feriado en Łądek Zdrój .....                               | 7  |
| <b>Mojose</b>  |    |
| <i>www.pej.pl</i> , E-legante .....  | 8  |
| <b>Raportoj, rakontoj</b>  |    |
| <i>Roman Dobrzyński, Robert Kamiński</i> , Vivo mi amas vin .....                                | 8  |
| <i>Robert Kamiński</i> , La sekva, nekutima, fluganta ZEO .....                                  | 10 |
| <i>Eruda Li el Koreio</i> , Virusa timego .....  | 12 |
| <b>Pri kio ni aŭdas</b>  |    |
| <i>Elżbieta Karczewska</i> , 10-jariĝo de „Esperanto-Libraro” .....                              | 13 |
| <i>Bjalistoka Esperanto Societo</i> , Literatura konkurso 2020 .....                             | 18 |
| <i>Libera Folio, Adam Wilkus</i> , La filma konkurso de UEA .....                                | 18 |
| <b>Vizitindaj lokoj</b>  |    |
| <i>Robert Kamiński</i> , Ĉarma loko ĉe Pilica .....  | 20 |
| <b>Homoj</b>   |    |
| <i>M. Komarnicka</i> , Mila – grava persono en konstruado de la pli bona mondo .....             | 24 |
| <b>Lingvosciencia angulo</b>   |    |
| <i>Plena Manlibro de E-a Gramatiko</i> , Rolvortetoj <i>De</i> rilate al ne-aga O-vorto – 1-a p. | 27 |
| <i>Roman Dobrzyński</i> , Ĉi aŭ VI .....   | 28 |
| <b>Literaturaĵoj</b>   |    |
| <i>Joanna Sokalska</i> , Kuracistoj sen limoj .....  | 30 |
| <b>Saĝulaj pensoj</b>  |    |
| <i>Andreo Bach</i> , Kiu povas malŝalti la interreton? .....                                     | 34 |
| <b>Leterkesto</b>  |    |
| <i>Adam Wilkus</i> , Memorbrikoj pri Odo Bujwid .....  | 36 |
| <i>Adam Wilkus</i> , Ni estu singardaj, Esperantaj Tagoj de Krakovo .....                        | 36 |
| <i>Przemysław Wierzbowski</i> , Germana ĵurnalisto en Bjalistoko .....                           | 38 |
| <b>Kalendaro</b>   | 39 |
| <b>Gazetaro pri Esperanto-movado</b>   |    |
| <i>www.wiatrak.nl</i> , “Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto estas pli bone kontaj...” .....         | 41 |
| <i>www.kalbi.pl</i> , “Tago de Zamenhof” .....   | 41 |
| <b>Oni eldonis</b>   |    |
| <i>Balladyna, Juliusz Słowacki</i> .....   | 42 |
| <b>Forpasis</b>  |    |
| <i>Marta Rak-Podgórska, Gizela Lange</i> .....   | 43 |
| <b>El fotogalerio de Andrzej Sochacki</b>  |    |
| <i>Andrzej Sochacki</i> , Vintra Studenta Esperanto-Lernejo .....                                | 44 |
| <i>Adam Wilkus</i> , Birda krucenigmo .....  | 47 |
| <i>https://mondafest.net/</i> , Mesaĝo de kuraĝo kaj espero .....                                | 50 |

Estimataj legantoj!

Pasas jam la kvara monato de la kronviroza pandemio. Esperantistaj organizaĵoj kaj movado preskaŭ ĉesis agi. Mi skribas preskaŭ, ĉar kelkaj Esperantaj aranĝoj okazas kaj okazos, danke al interreto. Grandaj kongresoj kaj renkontiĝoj havas spertajn helpantojn, kiuj aranĝas retajn kunvenojn. Ne ĉiam tio estas ebla. Esperantistoj, al kutimiĝintaj al la oftaj kontaktoj, komencas senti mankon de ili.

Kelkaj organizantoj kuraĝe kaj kun espero ne nuligas planatajn renkontiĝojn. En la pola esperantujo ĝis nun ne estas nuligita la 53-a Internacia Esperantista-Feriado en Łądek Zdrój kaj kelkaj aliaj, postaj kunvenoj. La bela somero instigas organizi renkontiĝojn, eĉ en malgrandaj grupoj. Nia movado fariĝis iom pli „sekreta” kaj „ĝardena”. Vi povas vidi tian ekzemplon sur la fotoj, senditaj al nia redakcio el PEA-filio en Szczecin. Kiom longe la pandemio ankoraŭ daŭros? Ĉu la nombro de malsanuloj kreskos? Kiam ni povos, sen timo, veni al hospitaloj, por kuracigi sanproblemojn ne kunligitaj kun la kronviruso? Tiaj nerespondeblaj demandoj daŭre turmentas nin. Ni devas kredi, ke ĉio, paŝo post paŝo, pliboniĝos kaj revenos al la akceptebla stato.

En la nuna numero de PE, ni rekomendas ne preterlasi la artikolon pri Inowłódz - ĉarma loko ĉe la rivero Pilica, kiun mi kelkfoje vizitis. Ĉirkaŭaĵo de Inowłódz estas kovrita per belegaj pinaj arbaregoj kaj estas plena de vizitindaj lokoj, kiel ekz. la pilgrima vilaĝo Poświętne, kun interesa preĝejo kaj klostro, la simbola tombo de majoro Henryk Dobrzański „Hubal”, kiu batalis tie kontraŭ germanoj ĝis 30.4.1940, aŭ trajnaj bunkroj en la vilaĝo Konewka.

Bonvolu legi ankaŭ la interesan artikolon de Elżbieta Karczewska, pri jam dekjara agado de la ununura Esperanto-libraro en Pollando. Legindas ankaŭ tekstoj de aliaj aŭtoroj, ekzemple Roman Dobrzyński kaj Andrzej Bach.

Agrablan legadon.

*Robert Kamiński*



Konewka

*Andrzej Jabłoński*

### Invito al Szczecin

Estimataj Samideanoj, Filio de Pola Esperanto-Asocio en Szczecin kore invitas vin al la sabata renkontiĝo “Bonvenon somero kun Esperanto”, kiu okazos en arbaro, situanta en la urbo, la 26-an de junio 2020. Oni povas veni jam la 26.06 matene kaj de la 16-a horo partopreni en la vendreda programo kaj poste tranokti ĉe esperantistoj. Bonvolu telefoni aŭ sendu SMS-on al Andrzej Jabłoński, tel. 603 103 227. Lia reta adreso: dembina2@wp.pl

---

*Elżbieta Karbowska*, la sekretario de ECIE

### Esperanto kaj UNESKO Renkontiĝo kun François Lo Jacomo

La 30-an de januaro 2020, Eŭropa Centro de Interkultura Edukado gastigis en sia sidejo en Wrocław esceptan personon: la francan politikiston, matematikiston, lingviston kaj esperantiston – d-ron François Lo Jacomo. Li plenumas plurajn gravajn funkciojn en E-movado. Interalie li estas la vicprezidanto de la Kulturdomo de Esperanto - Kastelo Greziljono, la sekretario de la Akademio de Esperanto, la komitatano de UEA (Universala Esperanto Asocio) kaj samtempe la reprezentanto de la Asocio ĉe UNESKO kaj ankaŭ li estas estrarano de la Internacia Akademio de la Sciencoj en San Marino.

François Lo Jacomo prelegis pri la temo „Esperanto kaj Unesko”, prezentante la historion de la lingvo Esperanto kaj 65-jaran kunlaboron de UEA kun UNESKO. En sia prelego li substrekis gravan rolon de la lingvo Esperanto kaj E-movado kaj tion, ke la prestiĝa revuo de Unesko „Unesco Kurier” aperas en dek lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Li kunportis kelkajn ekzemplerojn de la revuo en diversaj lingvoj. François Lo Jacomo prelegis en la lingvo Esperanto kaj Małgosia Komarnicka (la prezidantino de ECIE) tradukis polen.



La studentinoj de la E-kurso, kiun gvidas Małgosia Komarnicka, havis eblecon kontroli sian lingvokonon. Ili ankaŭ havis eblecon deklami Esperante versaĵojn de J. Tuwim, prezenti sin kaj rakonti pri siaj familioj kaj hobiaj. Malgraŭ tio, ke la renkontiĝo havis limigitan tempon, la publiko kaj la gasto trinkis kafon kaj manĝis bongustan, hejmfaritan kukon, kiun bakis



Irenka Solarek. La renkontiĝo ne povis longe daŭri, ĉar François Lo Jacomo iom malfruiĝis pro trafikŝtopigo en la urbo. La saman tagon la franca gasto kun Małgosia Komarnicka rapidis al Góra, kie jam atendis ilin lokaj esperantistoj.

La sekvan tagon, la 31-an de januaro 2020, en la Kulturdomo en Góra okazis interkonsentita renkontiĝo kun la lokaj esperantistoj kaj urbaj aŭtoritatoj. François Lo Jacomo denove prelegis pri „Esperanto kaj Unesko”. Pollingven tradukis M. Komarnicka. Inter publiko estis la direktoro de la Kulturdomo, Arkadiusz Gustaw kaj la urbestro de la urbo, Irena Krzyszkiewicz.

La publikon kaj invititajn gastojn salutis la prezidantino de la loka E-Klubo, Teresa Sybilak. Ŝiaj lernantoj de la Esperanto-kurso, kune kun la publiko, preparis ĝsojiganurprizon kantante la kanton „Saluton, saluton” kaj la urbestro enmanigis al François kaj al Małgosia donacojn. Post la prelego de François, la publiko, jam ĉe kafo kaj hejmfaritaj kukoj aŭskultis kantojn de la muzikgrupo *Na-Raz*. La muzikgrupo estis kreita pasintjare, nur por bezono de la Unua E-Turneo al Germanio kaj Francio, sed ĝi feliĉe laboras plu...

Renkontiĝoj kun esperantistoj helpas konvinkiĝi, ke la lingvo Esperanto funkcias kaj oni povas esprimi en ĝi ĉion. Por kursoj de la lingvo Esperanto, tiuj renkontiĝoj estas bonega okazo por revizi siajn lingvajn kapablecojn, kuraĝiĝi, ekkoni interesajn homojn kaj temojn.



*Małgorzata Komarnicka*

## La 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj ĉi-jare okazos

Kun la granda plezuro mi transdonas belan informon, ke la organizantoj de la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj decidis organizi ĝin ankaŭ ĉi-jare. La kronviroza pandemio malebligis organizadon de la kantfestivalo en ĝia ĝisnuna formo. Tial ĝi okazos **rete** kun la speciala dediĉo al **Mila van der Horst-Kolińska**, kiu de ekesto de la festivalo subtenis ĝian disvolvon.

Tiu nova, reta formo, ebligos partoprenon por pli granda nombro de personoj, kiuj ĝis nun, ĉefe pro financoj, ne povis partopreni en la aranĝo. Sufiĉas nur aliĝi kaj, poste, sendi filmeton kun kanto. Ĉi-jare estos tri kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo, 2. solisto, 3. kanto, registrita en studio. La aĝkategorioj estas la samaj: 0-18 jaroj / 19-54 jaroj / 55-111 jaroj. Ĉi-jare sufiĉas **kanti nur unu kanton en Esperanto**. La ĵurio, konsistanta el internaciaj specialistoj – esperantistoj kaj muzikistoj – ĉi-jare, pro la escepta situacio, pritaksos ĉefe lingvan kaj muzikan nivelon.

**Wrocław** miasto spotkań

Rezultoj de la festivalo kaj disdono de la premioj al la distingitaj partoprenantoj **okazos la 12-an de septembro**, ankaŭ interrete, dum la Koncerto de Premiitoj.

La honoran patronecon de la konkurso akceptis Jacek Sutryk, la Prezidanto de Vroclavo, Bohdan Aniszczyk, la Prezidanto de la Komisiono pri Edukado kaj Junularo kaj la organizaĵoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), EUROKKA (fakasocio de TEJO kaj muzika faka asocio de UEA, la kreinto de la eldonejo Vinilkosmo) junulara E revuo Juna Amiko kaj Varsovia Vento Elsendoj (interreta radio).



La organizanto - la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado invitas ĉiujn partopreni en la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj. Bonvolu sendi vian aliĝilon kaj filmeton **ĝis la 15a de aŭgusto 2020** – **atendas vin multaj belegaj premioj!**

Ĉiuj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: [festivalo.eo@gmail.com](mailto:festivalo.eo@gmail.com) (skribu en la temo de la mesaĝo: E-kanto) aŭ telefone +48 692 551 131, [www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl) / <https://www.facebook.com/efekantoj/>





## Esperantista feriado en Łądek Zdrój

Estimataj gesamideanoj, malgraŭ de la pandemia tempo, ni kredas, ke baldaŭ, kiam landlimoj estos malfermitaj, ni povos sufiĉe sekure vojaĝi.

Mi do volas informi vin, ke ni havas menditan - la konatan kaj ŝatatan de multaj el vi - ripozdomon "Apis" en Łądek Zdrój kaj ni intencas organizi la 53-an. IEF-on en la tagoj 2-10.09.2020.

La ripozodomo estas sufiĉe modesta, kun tre helpemaj dommajstroj, kiuj bone nutras siajn gastojn. La domo posedas grandan terason, kiun ni volonte uzadis por diversaj celoj (ĉefe por vesperaj rondancoj) kaj ĉedoman herbejon.

La programo en granda parto dependas de partoprenantoj, sed, kiel kutime, estas tre riĉa (lernado, muzikumado, interesaj prelegoj ktp.), kion spertis antaŭaj partoprenantoj.

Ĉijare povas esti iom pli modeste, eble malplinombre, pro la sekurecaj kialoj, sed certe estos interese kaj agrable.

Ni ĉiuj jam forte sopiras al komunaj renkontiĝoj, do ni esperu, ke septembro estos bona tempo por turismo kaj la feriado povos okazi.

Ni petas: sendu aliĝilojn, sed nun sen antaŭpago. Ĉio povos okazi ĝis septembro, do ni ne volus resendi viajn enpagojn. Kiam ni certos, ke la feriado okazos, tiam ni petos ĝiri la enpagon.

Ankaŭ la financa situacio povas ŝanĝiĝi, do vi estu preparitaj, ke la feriado povos kosti ĝis 850 zlotojn (220 eŭrojn por eksterlandanoj).

Por instigi vin pripensi nian proponon, mi invitas vin rigardi fotojn pri la pasintjara feriado.

Eniru la paĝon: [www.vroclavo.pl/esperanto/](http://www.vroclavo.pl/esperanto/), poste klaku la ligilon SEA kaj fotogalerio kaj elektu ĝustan temon. Kun sinceraj samideanaj salutoj

Prezidantino de SEA kaj la ĉefa organizantino de la 53. IEF - Teresa Pomorska.



## E-legante

La kronviroza pandemio kaŭzis gravajn ŝanĝojn en la mondo, ankaŭ en la mondo de esperantistoj – nuliĝis esperantistaj eventoj, kursoj kaj vojaĝoj. Tamen, la kvaranteno, kiu fariĝis deviga en pluraj landoj, estas ankaŭ ŝanco por praktiki Esperanton pere de la reto.

Tial Pola Esperanto-Junularo lanĉis projekton **E-legante**, kies celo estas krei serion de filmetoj, en kiuj esperantistoj legas siajn la plej ŝatatajn verkojn en Esperanto. Ĉu prozo aŭ poezio, ĉu literaturo originala aŭ tradukita – ni ŝatus inviti vin malkovri diversajn verkojn!

La serio spekteblas ĉe YouTube, en la kanalo de Pola Esperanto-Junularo. Se eblas, la filmetoj disponeblas laŭ la licenco CC BY. Bonvolu kontroli la priskribon de ĉiu filmeto, por vidi, kiun oni povas libere uzi.

## Raportoj, rakontoj

*Roman Dobrzyński, Robert Kamiński*

### Vivo mi amas vin

**Pola Esperantisto:** *Romano, via vivo de ĵurnalisto kaj esperantisto estas interesa. Kial vi ne verkas vian biografion?*

**Roman Dobrzyński:** Mi intencas komenci la verkadon ekde pli malpli dudeko da jaroj, sed mia vivo abundas je tiom da aktualaj agoj, ke mi ne trovas tempon po retrorigardi la pasintecon. Cetere mi daŭre hezitas, ĉu mi verku biografion por poloj, ĉu por esperantistoj. En ĝia pola versio prioritatus mia profesia vivo, en la alia mia por-Esperanta agado, kiu jam daŭras 65 jarojn.

*PE: Kion vi skribos unue?*

RD: Apenaŭ mi inventis provizorajn titolojn: *Romano pri Romano Esperante kaj Życie Romana* pole, kvankam mi ne certas, ĉu tiu ĉi esprimo ankoraŭ funkcias en la pola frazeologio.

*PE: Jes, laŭ mia scio la “vivo de Romano” koncernas homon, kiu kapablas kaj ŝatas uzi sian vivon por agrablaj, sed utilaj celoj.*

RD: Dankon. Via klarigo estu unu el ĉi-temaj difinoj. La **Proverbaro Esperanta** de Ludoviko Zamenhof enhavas interesajn lecionojn pri la vivo. Jen kelkaj: *Vivi en silko kaj veluro, en ĝojo kaj plezuro. Vivi kiel kuko en butero. Vivi kiel ĉe la brusto de Dio. Vivi larĝe kaj lukse. Vivi sate kaj glate.*

PE: *Jen la vivo de Romano!*

RD: Sed Zamenhof instruas pli: *Vivo glate ne fluas, ĉiam batas kaj skuas. Vivo sen modero kondukas al mizero. Vivo modera estas vivo sen danĝero. Vivon travivi estas art' malfacila. Vivis puninde, mortis ridinde. Kaj ankoraŭ kelkaj bonaj konsiloj: Vivon privatan kaŝu la muroj. Vivu stomako laŭ stato de l'sako. Vivu mizere, sed vivu libere! Vivu, progresu, sed lerni ne ĉesu.*

PE: *Diru iom pli pri la "Proverbaro Esperanta".*

RD: Kiel ĝia aŭtoro figuras Ludoviko Zamenhof<sup>1</sup>, sed oni scias, ke ĝi estas Esperantigita verko de lia patro, Marko Zamenhof, kiu ekde 1905 eldonadis kajerojn kun proverboj, kolektitaj de si mem en kvar lingvoj, nome la rusa, pola, germana kaj franca. Tiam venis en la kapon de la filo la ideo, ke io simila mankas en Esperanto kaj proponis al la patro aldoni la kvinan kolumnon en la internacia lingvo. Kaj tiel okazis.

PE: *Mi aŭdis, ke proverboj estas kolektiva saĝo de popoloj.*

RD: Kaj tial la perfekta Esperantigo de la kvarlingva proverbaro de Marko Zamenhof estis valora kontribuo de Ludoviko por pruvi, ke mensogas tiuj, kiuj asertas, ke Esperanto estas lingvo sen kulturo. Male, fundamentas ĝin ĉefe la kulturo de Eŭropo.

PE: *Eĉ de la antikva epoko.*

RD: Jes. Kiom da saĝaj proverboj kaj maksimumoj postlasis la antikvaj grekoj kaj romanoj! Lukrecio: *Vivon oni ricevas ne por havi, sed por uzi.* Seneko: *Vivo sen celo estas vagado. Por malfeliĉulo vivo estas tro longa, por feliĉulo – tro mallonga.* Hipokrato: *Vivo mallonga, arto eterna.* Palladius: *Vivo estas scenejo, lernu bone vian rolon.* Ktp, ktp...

PE: *Kaj kiun proverbon, maksimumon, sentencon vi aparte ŝatas?*

RD: Nu... Eble unu frazon el la rusa kanzono, belege tradukita en Esperanton:

*Vivo, mi amas vin! Kaj esperas, ke vi reciprokas. <sup>2</sup>*

1 Ludoviko Zamenhof, *Proverbaro Esperanta*, Stafeto, La Laguna 1974

2 *Vivo, mi amas vin.* Teksto: K. Vanŝenkin; muziko: E. Kolmanski; esperantigo: V. K. Gusev



## La sekva, nekutima, fluganta ZEO

Mi volas daŭrigi temon de flugantaj Zamenhof/Esperanto-Objektoj. Mi denove, en la interreta fotoarkivo, trovis informon kaj fotografaĵon pri la aviadilo, kiu portis esperantlingvan nomon. Ĉifoje temas pri bombaviadilo Lancaster, konstruita en 1941, dum la dua mondmilito.

Ni al kutimiĝis al simpatiaj ZEO – monumentoj, tabuloj, stratoj, ŝipoj ktp. kaj nun esperantlingva nomo estis uzita por tute ne paca armilo – granda nokta bombaviadilo Lancaster, kiu portis 6356 kg da bomboj kaj 8 maŝinpafilojn. Vere danĝera, mortiga ilo. Al la seppersona skipo de tiu ĉi aviadilo apartenis esperantisto, la oficiro Nelson Hill el Welington en Nov Zelando. Aliancanoj el tiu malproksima lando servis en britaj Reĝaj Aerofortoj (RAF). Certe li nomis la aviadilon per la nomo “La verda stelo” kaj pentris verdan stelon sur fuzelaĝo de la flugmaŝino. Esperanta nomo kaj simbolo vere donis esperon kaj feliĉon al la pilota skipo. Sur la alia fotografaĵo, sub la pilota kajuto, estas videblaj pentritaj simboloj de 42 bomboj, kio signifas ke la aviadilo partoprenis 42 foje en bombaj ekspedicioj. Dum la milito tia nombro de sukcesaj ekspedicioj estas vere impona. Pilotoj de la tagaj bombaviadiloj, statistike, travivis nur kelkajn ekspediciojn. Noktaj flugoj ankaŭ estis tre danĝeraj, ĉar pilotoj devas batali kontraŭ noktaj ĉasaviadiloj, kontraŭaviadila artilerio kun kontraŭaviadaj reflektiloj.





Jen traduko de la arkiva fotopriskribo:

“La originala, milittempa nomo: Bombaviadio Lancaster, kiu bombardis Germanion en multaj okazoj, portas sur sia fuzelaĝo nekutiman signon - verdan stelon, kaj la surskribon "LA VERDA STELO". Tradukitaj tiuj tri vortoj signifas al pli ol miliono da homoj, en cent diversaj landoj, komunikas la fakton, ke iu pilotanta la aviadilon interesiĝas pri la internacia lingvo Esperanto. Li estas la iama piloto de Lancaster, Oficiro NELSON HILL, de Wellington, Nov-Zelando. Kiam li alvenis al bomba bazo en la norda Anglujo, en la printempo de ĉi tiu jaro, li transprenis Lancaster "D", kaj akiris la ŝancon plenumi voton, kiun li faris, kiam li aliĝis al la aerarmeo. La bildo (elsendita 1944) montras - Oficiro NELSON HILL de Wellington, Nov-Zelando, Esperanto-entuziasmulo [en la kajuto] kun membroj de la skipo de "Lancaster D".

Ĉu Nelson Hill kun sia skipo travivis la duan mondmiliton? Ĉu bombaviadilo “La verda stelo” servis ĝis fino de la milito? Ĉu estis pafita dum bombekspedicio? Tiun demandon mi direktas al britaj kaj novzelandaj esperantistoj. Eble iu povas trovi informon pri esperantisto el la nigra-blanka foto\_kaj lia nekutime nomita flugmaŝino.

## Virusa timego



Karaj geamikoj, dum februaro kronviruso atakis Koreion kaj nun la tutan mondon. Multaj skribe demandis, kiel mi fartas, kaj nun mi demandas vin, kiel vi fartas. Hodiaŭ mi iom volas diri al vi, kiel mi fartis dum la katastrofo. Unue mia opinio: la timo ankaŭ infektas. Suferu tiom, kiom vi malsanas. Unue bv. legi la jenan rakonton:

Unu pilgrimanto iris cele al Bagdado. Survoje iu alia alvenis.

- kien vi iras? - demandis la pilgrimanto.

- al Bagdado.

- ankaŭ mi, ni havas la saman celon.

Tiel, la du kune marŝis al Bagdado. Survoje la malfrua alveninto petis de pilgrimanto porti lin sur dorso, dirante, ke li sentas doloron ĉe kruroj. La pligrimanto, do, portis lin sur sia dorso, kaj demandis:

- por kio vi iras al Bagdado?

- mi estas pesto, kaj iras al Bagdado por mortigi 30,000 homojn.

- ĉar mi helpis vin, malgrandigu la nombron de la mortintoj je 5000.

- bone, ĉar vi faris bonon al mi, mi mortigos nur 5,000.

- dankon, temen, kion mi faru, se vi ne plenumos la promeson?

- elvoku min per tiu ĉi sekreta vorto, kaj mi aperos antaŭ vi, tiam vi povas kulpigi min

Post la refreŝiĝo, la pesto rapidis al Bagdado.

La pilgrimanto fine ankaŭ alvenis al Bagdado, kaj vidis tie grandan katastrofon pro la pesto. La urbo jam plenis de la 30,000 mortintoj. La kolera pligrimanto elvokis la peston, kaj insultis:

- vi rompis la promeson, kaj mi mortigos vin laŭ nia interkonsento.

- momenton, kara sinjoro, mi mortigis nur 5,000 laŭ nia interkonsento.

- sed jam mortis 30,000 homoj pro la pesto en Bagdado.

- mi mortigis nur 5,000, kaj aliaj ne mortis pro la pesto.

- kial, do, aliaj 25.000 mortis?

- ili mortis ne pro la pesto, sed pro la timego(konsterniĝo).”

Mi legis la rakonton, kiam mi estis studento, antaŭ 50 jaroj, en iu Esperanto-libro (mi malsukcesis trovi la originalon, ĉu iu konas ĝin?), kaj



de tiam mi klopodas dum la vivo suferi tiom, kiom mi malsanas, perdi tiom, kiom mi perdas, esti laca tiom, kiom mi laciĝas, senti mankon tiom, kiom al mi mankas.

Jen venis la sezono de novaj ĝermoj kaj floroj. La orkido en verando, kiu atendis printempon, ekfloras. Kiel lastjare, post kelkaj tagoj, ĝi plene floras. Karaj geamikoj, post nokto, venas mateno, post vintro, venas printempo, ni ĉiuj plene enspiru la esperoplenan printempon!

Akceptu utilajn konsilojn de Eruda Li el Koreio.

Dum la malfacila tempo, mi deziras sanon kaj feliĉon por vi ĉiuj! Nuntempe pli gravas resti hejme. Ne iru eksteren, konservu sufiĉe da manĝaĵoj. se vi nepre devas iri eksteren, kunportu buŝŝirmilon.

kaj: 1. Manĝu pli da vitamino C, kiu povas plibonigi la imunecon.

2. Trinku varman akvon foje dum ĉirkaŭ 15 minutoj, por malsekigi la gorgŝon. Se la gorgŝo estas seka, bakterioj eniras rekte la pulmojn, se la gorgŝo estas malseka, la bakterioj eniras en la stomakon kaj estas mortigitaj per la stomaka suko.

3. Dum la epidemio trinku pli da fruktoteo aŭ Luo Han Guo teo (nomo de iu ĉina teo, 羅漢果茶) aŭ mielakvon por plibonigi pulman funkciadon.

4. Pli varmigu la loĝĉambron.

5. Bone kaj ofte lavu manojn, kaj se vi revenis el ekstere, bone purigu viajn ŝuojn per alkoholo.

6. Kantu Esperante.

Mi deziras kore: vi ĉiuj fartu bone kaj restu ĉiam sanaj.

<https://blog.naver.com/sokoguryo/221897310897>

<https://blog.naver.com/sokoguryo/221897412659>

## Pri kio ni aŭdas

*Elżbieta Karczewska*

### 10-jariĝo de „Esperanto-Libraro”

La 8-an de aŭgusto 2007, la urbestro de Bjalistoko, Tadeusz Truskolaski, dum la 92-a Universala Kongreso de Esperanto, renkontiĝis en Yokohamo kun la Estraro de UEA kaj proponis organizadon de la 94-a UK en Bjalistoko. Li deklaris engaĝigon de civitanoj de la urbo kaj la podlaĥia regiono kaj la konstantan

postkongresan memoraĵon, en la formo de Zamenhofcentro, enhavanta i.a. bibliotekon kun E-kolekto. Liaj proponoj estis akceptitaj.



Post 2 jaroj oni solene malfermis en Bjalistoko Zamenhofcentron. Mi ne povas rakonti al vi, la 12-an de majo, dum la jubilea festo en „Esperanto-Libraro”, pri dek pasintaj jaroj, ĉar la frenezanta en la mondo koronaviruso devigis nin fermi la pordon antaŭ niaj legantoj, sed mi proponas al ĉiuj virtuale vagabondi tra tiuj 10 jaroj de la komuna laboro kaj ludo.

Kiel bazo por la venonta biblioteko, servis libroj, kolektitaj pli frue fare de Fondumo Zamenhof. Publikigante informojn pri la UK en Bjalistoko, la organizantoj petis ĉiun partoprenanton alporti 1 Esperantan libron, eldonitan en loĝlando de la partoprenanto, kaj donaci ĝin al la organizata biblioteko. Tiamaniere Bjalistokon trafis i.a. „Marta” de Eliza Orzeszko, tradukita mem de Ludoviko Zamenhof kaj ornamita per la aŭtografo de la tradukinto: „Al glora verkistino kaj nobla idealistino sinjorino Eliza Orzeszko, kun plej sincera kaj profunda estimo, dediĉas L. Zamenhof.”

Siajn librokolektojn, aŭ iliajn partojn, transdonis malnovaj esperantistoj kiel la instruistino de Esperanto el Ełk Ewa Bondar, Teresa Nemere el Toruń, varsovianino Ewa Siurawska, la eldonisto Jan Skonieczka, esperantistoj el Olsztyn kaj Triurbo, la germana esperantisto – bibliotekisto Johano Pachter.

Daŭris esperantista petpropono: „Cent por cent - ni donacu 100 librojn por la centjariĝo de la Podlaĥia Libraro”.

La urbestro Truskolaski petis Podlaĥian Libraron – la plej grandan bibliotekon en la regiono – profesie organizi laboron de „E-Libraro”. En la jaro 2010, la regiona biblioteko festis sian 100-jariĝon, ĉar ĝuste en la jaro 1910 la Asocio pri Kreado kaj Funkciado de Bibliotekoj en Bjalistoko organizis la unuan publikan legejon en la Domo de Kempner ĉe la Germana strato. Unu el programeroj de la jubilea festo estis la solena malfermo, en Zamenhofcentro, de „Esperanto-Libraro” – la filio n-ro 14 de Podlaĥia Libraro. Oni kolektis en ĝi librojn, publikaĵojn en Esperanto, dokumentojn, ligitaj kun Ludoviko Zamenhof kaj kun Esperanto-movado. La malfermon, krom esperantistoj, ĉeestis direktoroj de la Pola Nacia Biblioteko, Podlaĥia Libraro, Bjalistoka Kulturcentro, vicprezidanto de Bjalistoko, marŝalo de la podlaĥia regiono kaj multaj landaj kaj



eksterlandaj gastoj. „Esperanto-Libraro” funkcias laŭ la reguloj, priskribitaj fare de la Pola Nacia Biablioteko kaj la direktoro de la Podlaĥia Libraro. La komunumo Bja-listoko kovras la kostojn de ĝia funkciado. En la momento de la malfermo, en ĝia inventaro, estis 1920 libroj kaj 102 titoloj de novaj kaj malnovaj E-ĵurnaloj.

Post 10 jaroj, sur niaj bretoj, ni havas 3648 librojn kaj 200 titolojn de ĵurnaloj.

Nia legantaro ĉefe devenas de Bjalistoko, sed pri konkretaj libroj demandas ankaŭ sciencistoj ekster la urbo kaj eksterlandanoj. Ni proponas belartan literaturon por infanoj kaj plenkreskuloj, sed ankaŭ sciencajn librojn. Partoprenantoj de Esperantaj kursoj trovas ĉi tie vortarojn, lernolibrojn, facilajn tekstojn por tuj legi kaj ekzerci. Fluparolantoj trovos sur niaj bretoj librojn, eldonitaj sur diversaj kontinentoj. Mian admiron vekas laboro de tradukistoj de scienc-fikcia literaturo. Ni havas librojn de Lem, Tolkien ktp.

Kun kortuŝo mi rememoras, ke en tiu komenca periodo, kolekti kaj prilabori librojn por la kreĝanta biblioteko, helpis la unua volontulo, laboranta por Bjalistoka Esperanto-Societo – la franco Kristof el Tuluzo. Li ankaŭ gvidis gastojn en Esperanto, dum la solena malfermo de Zamenhofcentro, kaj enkondukis novan kutimon, ke ĉiu sekva volontulo, simile kiel li, laboris merkrede en la E-biblioteko. Pasis jam 10 jarojn kaj 9 novaj volontuloj enskribis sian restadon ĉe ni, laborante kun legantoj kaj instruante Esperanton al la oficistinoj de Zamenhofcentro.

Dum 10 jaroj, la biblioteko kunlaboris kun la Infanĝardeno n-ro 52 Vinnie La Pu en Bjalistoko. En la lerneĵeto 6-jaraj infanoj ludante lernis Esperanton kaj, partopranante diversajn E-aranĝojn en la urbo, prezentis ludojn, recitis poeziaĵojn, kantis ĉiam vokante entuziasmon de la plenkreskula publiko.

Fiere ni povas diri, ke bibliotekaj gastoj devenis de ĉiuj enloĝataj kontinentoj. Ili vizitis Zamenhofcentron kaj ankaŭ la bibliotekon, kie ni certigis ilin pri utileco de Esperanto kaj pri tio, ke ne estas arto krei artefaritan lingvon – la arto estas konvinki homojn uzadi ĝin. Al tiuj, kiuj dubis, ni montris adresojn de E-kluboj proksime al iliaj loĝlokoj. Ofte ni observis, ke mirigitaj homoj prenis fotoaparatojn aŭ telefonojn, por registri tiujn adresojn. Estis al ni agrable dum diskuto trovi komunajn konatulojn, lokojn, vizititaj de ili kaj de ni, Esperantajn eŭropajn projektojn, dum kiuj ni estis en iliaj landoj...

Ni estas fieraj pro 49 E-libroj, eldonitaj en Bjalistoko, danke al kunlaboro kun esperantistoj, ne nur el Bjalistoko. Apartajn dankvortojn ni transdonas al niaj tradukistoj – Lidia Ligeża el Krakovo, Tomek Chmielik el Świdnik kaj Przemek Wierzbowski el Bjalistoko.

Ni dankas al niaj korektantoj: ĉefe al la hungaro Istvan Ertl, la kroato Josip Pleadin kaj aliaj, kiuj oferplene kontrolas kaj korektas la tekstojn, kiujn ni strebas publikigi.

Ni dankas al junularo kaj instruistoj el la 7-a Liceo en Bjalistoko, kiuj ne nur pretigis la grafikaĵojn por niaj 3 eldonitaj E-fabeloj, sed ankaŭ scenigis la fabelon „Kato Koloro” kaj prezentis ĝin i.a. dum ARKONES en Poznań kaj en la Porinfana Klinikio Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko.

Kun bjalistokaj eldonaĵoj ni vojaĝis tra la mondo kaj prezentis ilin dum E-aranĝoj. La promocio de la eldonita en Bjalistoko verko de la albana verkisto Fatos Kongoli – „Hunda haŭto” - okazis en Tirano. Tie ni, tradukisto kaj la aŭtoro estis gastigitaj de la Albana Akademio de Sciencoj kiel honoraj gastoj.

Ĉiujare ni eldonas en Esperanto sekvan verkon de la pola nacia literaturo, antaŭvidata por prezento dum la Nacia Legado.

Ege kore ni dankas al Przemek Wierzbowski, pro belegaj kovrilpaĝoj, korekto de multaj libroj, grafikaĵoj kaj afiŝoj pri aranĝoj. Ĝuste, danke al la homoj, similaj al li, ni tiom multe sukcesis.



La biblioteko estas malgranda, sed ĝiaj fieraj legantoj volonte partoprenas en niaj diversaj formoj de aktiveco.

Nia slogano sonas: „Esperanto ligas homojn”. La slogano ĝenerale simbolas komunan partoprenadon en la konkurso, kiu ĉiujare havas apartan titolon. Ni verkis pri elmigrintoj, civitanoj de la mondo; ĉijare ni verkas pri pandemio de kronviruso. La efiko de la ĉiujara kunlaboro de partoprenantoj estas 2-lingva kolekto de verkaĵoj, senditaj de landanoj kaj eksterlandanoj.



Ni dankas al bjalistokaj instruistoj de Esperanto: Grażyna Barszczewska-Banel, Mariola Pytel, Nina Pietuchowska kaj Andrzej Zejdlar pro ĉiujara kunlaboro dum tradukado kaj korektado de niaj „Bjalistokaj kajeroj” - la efikoj de la literaturaj konkursoj „Esperanto ligas homojn”. Niaj kajeroj troviĝas en la plej grandaj bibliotekoj en la mondo: en Vieno, Roterdamo, Aalen. Pro mankantaj egzempleroj kontaktis nin Staatsbibliothek zu Berlin. Ĉiujare la urbestro de Bjalistoko – la naskiĝurbo de la majstro Zamenhof kaj de la universala lingvo Esperanto - honore patronas niajn konkursojn.

Ni estimas paperajn eldonojn de libroj kaj pro tio ĉiujare ni organizas aranĝon „Ni dividu librojn”, dum kiu ni disdonadas centojn de jam

legitaj libroj en diversaj, publikaj lokoj

En la biblioteko ni organizas renkontiĝojn de legantoj kun Esperantaj verkistoj kaj tradukistoj.

Ĉie en la mondo ni promocias novajn librajn eldonaĵojn.

Laŭ petoj de partneroj, ni organizas inform- kaj edukrenkontiĝojn por la internacia gastaro, partoprenanta eŭropajn projektojn.

Kune kun legantoj kaj gastoj ni aliĝas al la festado de diversaj landaj kulturaranĝoj kiel Muzeaj Noktoj, Jaro de Moniuszko aŭ 100-jariĝo de Sendependeco de Pollando.

Dum la Foiro de Scienca Libro, organizata de la Universitata Scienca Biblioteko en Bjalistoko, ni prezentas konvenajn librojn en Esperanto, troviĝantaj en „Esperanto-Libraro”.

Ĉiam, dum nia agado, ni reprezentas Podlaĥian Libraron Łukasz Górnicki, sed ni estas konsciaj, ke nur bona kunlaboro kun Bjalistoka Kulturcentro kaj Bjalistoka E-Societo garantias al nia malgranda biblioteko sukceson. Ni ĝojas, pro la subteno de niaj partneroj kaj pro nia fruktodona kunlaboro.





BES

## Literatura Konkurso 2020 „Pandemio – neĉiutaga ĉiutageco”

Podlaĥia Libraro en Bjalistoko kaj Bjalistoka Esperanto-Societo anoncas la 10-an literaturan konkurson „Esperanto ligas homojn”, ĉijare por rakonto, je la temo „**Pandemio – neĉiutaga ĉiutageco**”.

La konkursa regularo trovebla ĉe:

<https://espero.bialystok.pl/eo/literatura-konkurso-2020/>

---

*Libera folio, Adam Wilkus*

## La filma konkurso de UEA

Por instigi esperantistojn krei filmetojn pri sia loka asocio aŭ klubo, Universala Esperanto Asocio (UEA) kun Ĉina Radio Internacia (ĈRI) pasintjare lanĉis **la filmkonkurson “Mia asocio, mia urbo”**. Laŭ la anonco: “*La konkurso celas diskonigi Esperanto-asociojn en diversaj lokoj de la mondo samkiel la lokajn kulturaĵojn de la urboj, kie situas la E-asocioj.* La juĝa komisiono konsistis el Selena Wang Fang, Wang Weishi, Qiu Jieming, Aleks Kadar, Fernando Maia Jr. kaj Trezoro Huang Yinbao.

Entute 35 filmetoj partoprenis en la konkurso pri 30 asocioj el 15 landoj kaj 5 kontinentoj. 11 filmetoj venis de ĈRI pri ĉinaj urboj, sed ili ne estis prijuĝitaj (por esti neŭtrala). La tri plej bonaj filmetoj ricevos senpagan aliĝon al la Universala Kongreso en Montrealo, senpagan loĝadon dum la kongreso kaj repagon de la vojaĝkosto al la UK ĝis 500 eŭroj. Dum la UK, la filmetoj estos montritaj kaj la gajnintoj ricevos formalan distingon. Por instigi partoprenadon, la unuaj 10 filmetoj, senditaj al la konkurso, ricevis po 100 eŭrojn.

La gajninto estis Alexandra Mendieta pri sia naskiĝurbo Minga Guazú en Paragvajo. La filmeto estas altkvalita, kun klara parolmaniero kaj bona muntado, ĝi tenas la atenton de la spektantoj kaj evitas tedajn paroladojn.





Ne ekzistas klubo en ŝia urbo kaj Paragvajo neniam havis nacian asocion, sed anstataŭe ŝi parolis pri siaj personaj spertoj kun la lingvo kaj pri sia grupeto de lernantoj. La filmeto montras la urbon, parolas pri la indiĝena lingvo, la gvarania (oficiala lingvo de Paragvajo), naturo en la urbo (preskaŭ ĉiu domo havas arbon) kaj populara loka trinkaĵo.

La duan lokon atingis Alekso Miller kaj la urbo Atlanto, en la ŝtato Georgio en Usono. La filmeto montras du renkontiĝojn de la loka klubo en trinkejoj kaj babiladon de la lokaj esperantistoj pri la klubo kaj siaj spertoj kun Esperanto. La dua renkontiĝo estas ĉe la teatraĵo de Vilhelmo Ŝekspiro, Reĝo Lear. Fine, li montras sian domon (kie loĝas ankaŭ aliaj aktoroj kaj filmistoj) kaj invitas vizitantojn.

La tria premio iris al Gafur Mirzo pri Taŝkento, la ĉefurbo de Uzbekio, kiun li nomas la plej bela urbo en la mondo. La filmeto aspektas kiel turistinformilo kun aldonita esperantlingva parolado. Ĝi parolas pri la kulturo kaj la bongusta manĝo en la lando. Li informas pri la aktivado de la asocio en la urbo kaj la kursoj por instrui la lingvon. La filmeto finiĝas per kanto pri Esperanto, kantata de la filmisto.


La juĝistoj decidis aldoni kvaran kaj kvinan premiojn kun senpaga aliĝo al UK kaj pago de 200 aŭ 300 eŭroj por vojaĝkostoj. La kvara loko estis gajnita de Daria Slonova pri la urbo Svitavy, Ĉeĥio, kiu enhavas muzeon pri Esperanto. Al la kvina loko venis François Randin pri la urbo Lausanne, Svislando; la parolanto dum la filmeto estas pluŝa kuniklo.

Menciindas, ke la filmkonkurso partoprenis ankaŭ samideanoj kaj asocioj el Kolombio, Meksiko, Brazilio, Burundo, Italio, Francio, Slovakio kaj Pollando. Ĉiuj filmoj spekteblas en YouTube: <https://tiny.pl/7wld4>. Unu el la filmoj estas pri la esperantistaro en Krakovo: <https://tiny.pl/7cwlj>.

Ni instigas membrojn de aliaj polaj E-kluboj prepari similan "video-vizitkarton" pri siaj asocio kaj urbo kiel krakovanoj ĉar tio helpas popularigi E-klubon kaj disvastigi informon pri loka E-agado.



X'ian (1) Mia Asocio, Mia Urbo, Konekte kun Esperantaj Organizoj



*Robert Kamiński*

### Ĉarma loko ĉe Pilica

Hodiaŭ mi volas prezenti malgrandan lokon kun riĉa historio. Iam la urbo, ĉirkaŭita per la defenda muro, kaj hodiaŭ malgranda, dormema vilaĝo. Tamen, la spuroj de ĝia longa historio estas nun videblaj en kelkaj lokoj. Inowłódz nun estas malgranda vilaĝo en la centra Pollando, proksime al Tomaszów Mazowiecki (17 km), situanta ĉe la rivero Pilica. La setlejo, en la loko de la nuna Inowłódz, ekzistis jam en la 10-a jarcento. Inowłódz estas menciita en la dokumento el 1145, en kiu legeblas, ke jam tiutempe ekzistis preĝejo (nun la filia preĝejo al la sankta Idzi), fondita de la princo Władysław Herman, en 1086. Ĉe la turnopunkto de la 9-a kaj 10-a jarcentoj, la loka transveturo tra la rivero Pilica estis grava elemento de landaj kaj longdistancaj trakoj, kondukantaj, inter alie al Rusio kaj Hungario. Meze de la dektria jarcento Inowłódz apartenis al la grupo de pli grandaj setlejoj de la centra Pilica regiono. Ĝi ricevis la urbajn rajtojn meze de la 14-a jarcento de la reĝo Kazimiro la Granda (1310-1370), kaj tiam estis starigita la Inowłódz-kastelo, kiu nun estas unu el ĝiaj plej interesaj antikvaĵoj. La ruinoj de la mezepoka reĝa kastelo situas en la centro de la vilaĝo. La ĉefa tasko de la fortikaĵo estis protekti la lokan doganejon, ĉe la travadejo, troviĝanta sur la komerca vojo de Lviv, trans Sandomierz, al Toruń. En la unua duono de la 15-a jarcento, la kastelo fariĝis posedaĵo de membroj de la potenca nobla familio Drzewicki kun la blazono Ciołek. Dum jarcentoj, la fortikaĵo estis rekonstruata kaj pligrandigata plurfoje. La lasta, grava modernigo efektiviĝis meze de la 17-a jarcento, kiam la urbo estis administrita de la reĝa kortegano Jan Olbracht Lipski el Lipia.



La laboroj estis interrompitaj pro la eksplodo de la milito kun Svedio, dum kiu la kastelo estis grave difektita. La konstruaĵo estis en tiom malbona stato, ke la posedantoj decidis forlasi ĝin. Ekde tiam, la neglektita kaj detruita fortikaĵo komencis iom post iom fariĝi ĉiam pli granda ruino. En la 19-a jarcento, la lokaj loĝantoj malkonstruis parton de la muroj, por akiri konstruan materialon por siaj domoj. La unuaj konservadlaboroj efektiviĝis nur post la dua mondmilito. Tiam oni decidis rekonstrui la kastelon en la formo de la tiel nomata - daŭra ruino. Ĉi tiu plano realiĝis en la unua jardeko de la 21-a jarcento, parte dank' al financoj de Eŭropa Unio. Nuntempe, la kastelo estas malfermita por vizitantoj.



Vizitante Inowłódz, indas ankaŭ viziti la romanikan preĝejon al la sankta Idzi. Ĉi tiu templo estis konstruita en la 11-a jarcento. Laŭ legendo, iniciate de Władysław Herman, kiel oferado pro la naskiĝo de lia filo Bolesław. Ĝia formo estas tipa dum mezepoko, defenda arkitekturo.

Por la konstruado, estis uzita la loka, malmola ferohava sabloŝtono. (Nuntempe, historiistoj supozas, ke la preĝejon oni konstruis iom poste, komence aŭ meze de la 12-a jarcento). La preĝejo estis konstruita, kiel preskaŭ ĉiuj romanikaj konstruaĵoj, sur la orient-okcidenta akso. Ĝi konsistas el unuspaca navo, en la formo de plilongigita rektangulo, finiĝanta per duoncirkla absido de la oriento kaj la ronda turo de la okcidento. La okcidenta parto de la navo enhavas galerion, apogitan sur la centra poluso, kaj muraj pilastroj, konektitaj per arkaĵoj. Ĉe la norda muro de la templo estas sakristio, aldonita poste, en la baroka stilo. Komence, la preĝejo servis kiel kapelo. Poste, pro disvolviĝo de la setlejo, ĝi fariĝis paroka preĝejo. Ĝi plenumis ĉi tiun funkcion ĝis 1520, kiam konstruiĝis la

dua preĝejo en Inowłódz al sankta Arkianĝelo Mikaelo kaj tien oni translokigis la paroĥejon.



Dum la unua mondmilito, la preĝejo estis grave damaĝita. La ĝenerala konservado kaj rekonstruado okazis en 1936-1938. Dum la dua mondmilito, estis detruita la preĝeja turo, kiu, post kelka tempo, estis rekonstruita. La preĝejo estas unu el la interesaj objektoj sur la "Romanika Vojo". En ĝia najbareco, troviĝas la observa teraso kun skulptaĵoj, prezentantaj la princojn Władysław Herman kaj Bolesław. En la preĝejo, intence, oni ne

instaligis elektron kaj someraj mesoj, celebrataj ĉefe por turistoj, okazas en la „mezepoka etoso”, en kandela lumo.

Alia interesa kaj bone konservita konstruaĵo estas la juda sinagogo, konstruita en la unua duono de la 19-a jarcento. Dum la dua mondmilito, la nazioj detruis la sinagogon. Dum la batalado en 1945, la sinagogo ekbrulis, kio pligrandigis la detruon. Post la milito, la sinagogo servis kiel stokejo de sterko kaj salo por la Komunuma Kooperativo "Samopomoc Chłopska", poste kiel vendejo. En 1975, la konstruaĵo estis transdonita al la Urba Publika Biblioteko. En la jaroj 1978-1982, grava renovigo de la konstruaĵo efektiviĝis el la financoj de la juda





fondaĵo *Joint*. Tiutempe, en la interno estis konservitaj ekzistantaj fragmentoj de la polikromio.



Sur muroj de la ĉefa preĝĉambro, troviĝas la restaĵoj de la originala polikromio, datita al la dua duono de la 19-a jarcento. Inter la fenestroj konserviĝas, unikaj en Pollando, du tabuloj kun surskribitaj preĝoj, intence je la reganta caro (hebr. *Hanoten Teszua lamelachim*) - sur la suda muro en la hebrea, sur la norda en la rusa. En la konvena loko estas enskribitaj personaj datumoj pri la caro Nikolao la 2-a Aleksandrowicz kaj lia familio. Tamen, la tuta tabulo estas pli malnova. Oni povas vidi, ke la nomoj de antaŭaj caroj estis farbitaj, kaj sur tiu spaco estis pentritaj novaj aktualaj nomoj. Ambaŭ tabuloj estas kovritaj per kronoj. En Inowłódz troviĝas ankaŭ restaĵoj de la juda tombejo.

Menciindas ankaŭ la sanigaj avantaĝoj de la vilaĝo. Post la malkovro (komence de la 19-a jarcento) de la mineralakva fonto, la posedanto de bienoj Inowłódz, Bernard Birenzweig, fondis klimatan stacion en Inowłódz - Zakościele. En 1884 estis konstruitaj, por kuracgastoj, pluraj vilaoj-pensionoj kun ĉambroj de medicinaj servoj per naturkuracado kaj estis aranĝita banloko, ĉe la rivero Pilica. De majo ĝis septembro, kuracatoj kaj feriantoj gastis en la banloko Inowłódz. Somerajn feriojn pasigis tie Julian Tuwim, kiu donis en siaj verkoj la plej bonan ateston pri la pejzaĝo kaj kultura valoro de la regiono. La disvolviĝo de la banurbo estis finita dum la unua mondmilito. Tamen, feriaj tradicioj vivas plu. Hodiaŭ Inowłódz estas konata, turisma kaj ripoza loko.

Indas viziti la lokon, kaj vojaĝo tien povas esti kombinita kun vizito en la proksima feriejo Spała.

*Malgorzata Komarnicka*

## Mila – grava persono en konstruado de la pli bona mondo

La 13-an de decembro 2019, je la 2-a horo nokte, en Hago, Nederlando, en maljunuldomo, mortis Mila van der Horst-Kolińska, homo kun la granda koro. Pri la morto de Mila mi eksciis de mia amikino ĉi-jare januare, kiam mi preparis informojn pri jam la 8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj, kies honora patrono Mila estis ĉiujare. La informo pri ŝia morto estis por mi granda ŝoko. Ŝi ĉiam estis energia, dinamika, aktiva, rapidparolanta, plena de vivo kaj ege helpema ... Tiu bildo de Mila restos kun mi kaj ankaŭ ŝia vivmoto “Unu belon havas homo dum la tera vivo. Amikeco ĝia nomo, amikeco kora, vera”.


Mi ekkonis Mila'n koresponde. Ŝi trovis min sendante iun demandon. Tiu kontakto tuj, jam de la unuaj vortoj, transformiĝis en profundan ligon, amikecon kaj fidon. De tiu momento komenciĝas ankaŭ ŝanĝiĝi mia vivo, mia perceptado de la mondo. Ĉiusemajne, lunde matene ni havis telefonan renkontiĝon. Ni ŝercis, ke okazas privata E-kunveno. Mi ege ŝatis tiujn renkontiĝojn, ĉar Mila estis “vivanta historio” de E-movado. Ŝi konis multajn gravajn personojn kaj scipovis sincere ilin priskribi, sen ilia “eksterordinareco kaj legendo”.

Ŝi ege kredis je destino. Laŭ ŝi, ni ekkonis unu la alian dank' al destino. Ŝi scipovis prezenti multajn ekzemplojn, kiamaniere destino influis ŝian vivon. Ŝi tiel forte kredis je destino, ke sian biografion ŝi titolis “Destino”. Mi estis ege surprizita ricevante de ŝi, preskaŭ tuj post nia kontaktiĝo, tiun biografion. Legante ĝin, mi pli bone ekkonis Mila'n. Ŝi naskiĝis la 26-an de aprilo 1927, en Parafianów, en Pollando kiel Mirosława Kasprzak (legu: Kaspŝak). Ŝia patrino estis filino





de pol-rusa paro kaj la patro estis polo. Ŝi pasigis sian infanaĝon en bela domo, kun granda ĝardeno, konstruita de gepatroj ekster la urbo. Ŝi ŝatis legi librojn, precipe biografiojn, kaj tiaj libroj en ŝia hejma biblioteko estis plej multaj. Estinte naŭjaraĝa Mila provis trovi respondon je la demando: kial oni devas paroli pole, ruse, jude, germane kaj ne per komuna lingvo, kiun scios ĉiuj homoj? Tiam ŝi ankoraŭ ne sciis, ke tiu komuna lingvo jam ekzistas kaj ĝi nomiĝas Esperanto. Ŝi ĉiam, ankaŭ en sia biografio, substrekis, ke la plej grava fakto en ŝia vivo estis lernado kaj poste instruado de la lingvo Esperanto. Esperanto fariĝis celo kaj pasio de ŝia vivo. Ĝi malfermis al ŝi la vojon al bela mondo kaj ankaŭ estis por ŝi konfirmo, ke destino ekzistas. Ŝi opiniis, ke estas malpermesite neglekti la signojn, kiujn donas al ni destino kaj oni devas sekvi ilin kaj tiam ni atingas feliĉon. Mila estis feliĉa malgraŭ tio, ke ŝi multfoje, dum la tuta vivo, ricevis batojn ankaŭ de esperantistaro. Tio dolorigis ŝin, sed ŝi opiniis, ke malbonaj agoj multe pli dolorigas tiujn, kiuj ilin faras. Ŝi forĵetis tiujn malagrablaĵojn el sia memoro. Mi multe lernis de ŝi. Mi ankoraŭ nun aŭdas ŝian fortan voĉon: “Sekvu bonon kaj bonon atendu, forĵetu timon kaj vi estos feliĉa”. Ŝi neniam timis kaj ŝatis substreki, ke dank’ al sia zodiak-signo Taŭro, ŝi estas praktika, laborema, obstina kaj bone organizita. Ŝi ofte ripetis, ke ŝi apartenas al tiuj virinoj, kiuj kuraĝis vivi laŭ la propra stilo kaj neniam klopodis plaĉi al aliaj. Sincere ŝi konfesis, ke ŝi ne ŝatas okupiĝi nur pri kuirado kaj purigado de loĝejo, ĉar oni devas havi memstaran laboron, kiu montras valoron kiel homo kaj la hejmlaboroj nur stultigas. Varme ŝi rememoris sian volontulan laboron en la Internacia Esperanto-Instituto, siajn kursojn laŭ la aŭdvida metodo de Tibor Sekelj, kiun ĉiam ŝi donis kiel ekzemplon por imiti. Ŝi fieris, ke oni nomas ŝin la “Patrino de Mazi”; dank’ al ŝi realiĝis la E-versio de la konata kaj iam tre populara kurso “Mazi en Gondolando”. Ŝi ankaŭ ofte rakontis pri sia feliĉa vivo kun la edzo, esperantisto - Gerard van der Horst, kaj kiom ili ambaŭ devis suferi,



por finfine esti kune. Gerard estis efektivigo de ŝiaj revoj pri la viro. Li do devis havi “interesan enhavon, kaj do la karakteron, inteligentecon kaj spritan bonhumoron”. Ŝi ofte diris al mi, ke “ĉiuj malfacilaĵoj, kiuj aperas sur nia vivovojo instruas nin kiel venki ilin. Dank’ al tio ni fariĝas pli fortaj

kaj bonaj. Gravas ankaŭ, ke ni estu optimistoj, ĉar tiu eco multe helpas en la vivo. Kaj neniam ni estu al ni mem malamiko, sed ni amu nin, ĉar tiam ni scipovos disdoni feliĉon”.

Mila van der Horst-Kolińska, pro sia multflanka E-agado, ricevis multajn distingojn kaj fariĝis honora membro de gravaj E-organizaĵoj - UEA, ILEI, SAT... Por ŝi, tiuj ĉiuj honorigoj kaj distingoj ne estis la plej alta valoro, sed nur rimedo por realigi tion, kio vere valoris en ŝia vivo, kio feliĉigis ŝin. Ŝin feliĉigis popularigi Esperanton, enkonduki ĝin en la praktikan vivon, montri ĝian valoron al la ekstera mondo. Pro tio ŝi tiom entuziasme akceptis kunlaboron kun Instituto por Oficialigo de Esperanto (IOE).



Kiam ŝi transloĝiĝis en maljunuldomon, finiĝis niaj telefonaj kontaktoj. Mi jam ne havis eblecon senpere kontaktiĝi kun ŝi, sed mi sentis ŝian ŝirmon. Ŝi ĉiam diris, ke ŝiaj anĝeletoj

estas ankaŭ kun mi, ĉar, laŭ ŝi, mia destino estas E-vojo kaj ŝia destino estis trovi min kaj helpi tion kompreni. Mi ĉiam estos al Mila ege danka, pro ŝia vera E-koro kaj granda helpo, kiun mi ricevis de ŝi. Mi neniam forgesos tagon, kiam mi prezentis al ŝi mian ideon krei kantfestivalon, Eŭropan Festivalon de Esperantaj Kantoj, kiu ĉi-jare okazos jam okan fojon kaj escepte nun interrete, pro la kronvirova pandemio ... Ŝi ĉiujare estis honora patrono de la festivalo kaj ĉiam ŝi estis ĉe mi, precipe dum ĉiuj malfacilaj momentoj. Tiam ŝi aldonis al mi kuraĝon per vortoj: “viaj sukcesoj ne al ĉiuj plaĉas, neglektu tion, ĉar la plej bona vojo estas daŭrigi laboron, kiu plaĉas al vi kaj kiun vi opinias valora. Mi la samon iam travivis. Fidu min”.

Mila van der Horst-Kolińska certe ne estas unusignifa persono, sed por mi, ŝi ĉiam estos belega homo, esperantistino kun la grandega E-koro, kiu heredigis al ni ĉiuj multajn valoraĵojn, sed antaŭ ĉio, belegan vivkoncepton en konstruado de la pli bona mondo.

## De rilate al ne-aga O-vorto – unua parto

*De*-esprimo, kiu rolas kiel priskribo de ne-aga O-vorto, povas montri multajn diversajn signifojn. Ĝenerale *de* montras ian rilaton inter la priskribata afero kaj la *de*-esprimo.

Aparteno

**Plej ofte *de*-esprimo montras apartenon ĉe ne-aga O-vorto. La vorto “aparteno” havas tiam tre vastan signifon. Povas esti posedo, haveco, apudeco, alligiteco, parteco, parenceco aŭ alia formo de aparteno:**

- *Jen kuŝas la ĉapelo de la patro.* La ĉapelo apartenas al la patro kiel posedaĵo aŭ havaĵo.
- *Jen estas la kajero de la juna fraŭlino.* La kajero apartenas al la fraŭlino kiel posedaĵo.
- *La dentoj de leono estas akraj.* La dentoj apartenas al leono kiel korpopartoj.
- *Li faris ĉion per la dek fingroj de siaj manoj.* La fingroj apartenas al la manoj kiel korpopartoj.
- *Sur la bordo de la maro staris amaso da homoj.* La bordo apartenas al la maro, ĉar ĝi troviĝas tuj apud ĝi.
- *Januaro estas la unua monato de la jaro.* Monatoj estas partoj de jaro.
- *La dudeka (tago) de Februaro estas la kvindek-unua tago de la jaro.*
- *La kuiristino direktis sin en la internajn partojn de la loĝejo.*
- *La filo de la reĝo [...] ŝin renkontis.* La filo apartenas al la reĝo kiel parenco.
- *Mi legos poemon de Zamenhof.* La poemo apartenas al Zamenhof, ĉar li verkis ĝin.
- *Tio verŝajne estas speco de ĝardena kreskaĵo!* La speco apartenas al la klaso “ĝardena kreskaĵo”.
- *Meze sur la muro pendis portreto de bela juna kaj vivema virino.* La portreto apartenas al la virino, ĉar ĝi montras ŝian aspekton.

- **Glaso de vino** estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino. La glaso apartenas al vino, ĉar ĝi estas uzata por vino.
- **Ŝi estas profesoro de matematiko**. La profesoreco apartenas al la fako matematiko. Oni povas ankaŭ uzi *pri*.
- **La riĉeco de tiu ĉi homo** estas granda. La riĉeco apartenas al la homo, ĉar ĝi estas unu el ties ecoj.
- **Tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro**. La signifo apartenas al la ideo “mezuro”.

---

Roman Dobrzyński

## CI aŭ VI

Antaŭ 65 jaroj mi komencis lerni Esperanton kaj havigis al mi jenan scion pri la personaj pronomoj: singularaj - **mi, vi-ci, li, ŝi, ĝi**; pluralaj- **ni, vi, ili**. Oni instruis min, ke en konversacio kun konatulo, amiko, familiano oni rajtas nomi unu la alian „**ci**”, sed al persono nekonata, pli aĝa ktp. necesas, pro ĝentileco, turni sin per la pronomo „**vi**”. Tiel mi faris ĉiam, konvinkite, ke tio estas regulo el la fama „unua libro” de Dr-o Esperanto, „Lingvo Internacia”, (1887). Sed, antaŭ kelka tempo, la komencanta esperantistino el Szczecin, Halina Rózanek konsternis min per la informo, ke en tiu ĉi libro la pronomo „**ci**” tute ne ekzistas. Mi tuj kontrolis gramatikan parton en la libro, rigardis la alineon pri personaj pronomoj kaj mi konstatis, ke Halina pravas. Zamenhof proponis „**vi**” kiel la duan personan pronomon por ambaŭ nombroj - singulara kaj plurala. Do „**vi**” havas duoblan funkcion, tradukita en la polan lingvon signifas „**ty**” kaj „**wy**”.

Unu jaron post la apero de la „unua libro”, d-ro Esperanto eldonis publikaĵon kun la titolo „Dua Libro de l’lingvo Internacia” (1888). En la ĉapitro III-4, la aŭtoro klarigas: „*Vi* ni diras egale al unu persono kaj al multaj; tio ĉi estas farita pro oportuneco, ĉar, parolante kun iu, ni ofte ne scias kiel diri al li: „*vi*” aŭ „*ci*”. Inter krampoj troviĝas kroma komento: „*Ci*” signifas la duan personon de l’ununombro, sed tiu ĉi vorto estas trovata sole en la plena vortaro; en la lingvo mem ĝi preskaŭ neniam estas uzata.

El tiuj ĉi frazoj ni ekscias, ke la pronomo „**ci**” ekzistas en la lingvo ekde ĝia komenco. D-ro Esperanto prezentis ambaŭ librojn kiel iniciatajn publikaĵojn de sia lingvo, kiuj bezonis publikan diskuton kaj eventualan reformon. Nur en la jaro 1905 estis eldonita „Fundamento de Esperanto”, kiu fariĝis ne plu ŝanĝebla „biblio” de la lingvo internacia. En ĝia

„Universala Vortaro” la pronomo „**ci**” trovis lokon, ĝi estis tradukita en kvin lingvojn, interalie en la polan, kiel „**ty**”.

La „unua libro”, eldonita en 1887, entenas „Kompletan Lernolibron”, kiu konsistas el 16 reguloj kaj okupas nur 4 paĝojn. „Plena Analiza Gramatiko” de K. Kalocsay kaj G. Waringhien, eldonita cent jarojn poste, ampleksas 600 paĝojn. PAG prezentas „**vi**” kiel la personan pronomon en ambaŭ nombroj kaj klarigas: *tion kaŭzis naciaj kutimoj, kiuj igis opinii neĝentila la alparoladon al unu persono per singulara pronomo „**ci**”*. Tio estas ripeto de la malnova aserto de Zamenhof: *En la lingvo mem ĝi estas preskaŭ neniam uzata*. Pro kio ĝi ne estas uzata? Laŭ Kalocsay kaj Waringhien: *tion kaŭzis naciaj kutimoj*. Trudas sin demando: Kiu naciaj kutimoj?

Miaopinie temas ĉefe pri la kutimo de rusoj kaj francoj, kiuj forte influis la „beban” Esperanton. Sed esperantistoj de multaj nacioj ne konsideras malĝentilaj siajn singularajn duajn personajn pronomojn kaj ofte uzas ilin en la ĉiutaga parolo; ekzemple germanoj „**du**”, hispanoj „**tu**”, poloj „**ty**”. Por esprimi sian ĝentilecon, ili uzas la trian personon pronomon respektive: **Sie, Usted, Pan**. En la pola lingvo „**vi**” ne posedas ĝentilecan kvaliton, ĝi estas nur plurala dua persona pronomo kaj nenio pli. En la komunista epoko estis altrudata la rusa kutimo uzi „**wy**” („**vi**”). Sensukcese. Oni praktikis tiun ĉi pronomon nur en oficialaj aranĝoj, ĉefe dum partiaj kunvenoj, sed je la fino, oni tuj turnis sin unu al la alia per „**ty**” aŭ „**pan**”, „**pani**”.

Ekde la „unua libro” ŝanĝiĝis kutimoj en ĉiuj landoj. La dua singulara persona pronomo estas nun treege ofte aŭdebla en ĉiutaga interparolo. Kial do en Esperanto ĝi estas *preskaŭ neniam uzata*? Mi persone sentas ĝian mankon. Eĉ strange ŝajnas por mi alparoli mian amikon per la pronomo „**vi**”, dum ekde longa tempo li estas por mi „**ci**”. La itala verkisto Sen Rodin (Filippo Franceschi) opinias, ke la diskrimino de „**ci**” malriĉigis nian lingvon. „**Vi**” kun duobla senco estas konfuza kaj limigas la stilon. Kutimoj dum longa daŭro ŝanĝiĝas en leĝojn. Tiel okazis la dampo de „**ci**” fare de „**vi**”.

Antaŭ kelkaj jardekoj ardis disputo inter „**ata**” kaj „**ita**”. Mi ne intencas provoki novan militon pro la du pronomoj. Nur mi deziras konsciigi samideanojn, ke Esperanto, kiel aliaj lingvoj, posedas aŭtonoman, duan personan pronomon „**ci**”. Ĝi estas trovebla en kiu ajn Esperanta vortaro. Legitimas ĝian legalecon „Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto” (2005) per jena difino: „*Ci*” – *pronomo uzebla por nomi la alparolaton. (...) „ci” estas tre malofte uzata, ĝin kutime anstataŭas „vi*”. Se „**vi**” estas anstataŭanto pro

„nacia kutimo”, oni rajtas silogisme konkludi, ke ĝuste „ci” estas originala pronomo de la dua persono de la singulara nombro.

Ĝi rajtas alvoki: Samideanoj, mi estas je Via dispono. Liberigu min el la fermita kaĝo. Uzu min!

## Literaturaĵoj

Ni publikigas la rakonton: “Kuracistoj sen limo”, premiitan (La unua premio) en la bjalistoka literatura konkurso - „Esperanto ligas homojn” - Mi estas civitano de la mondo” - 2019, en ĝia originala formo sen korektoj de la Redakcio

*Joanna Sokalska*

### Kuracistoj sen limoj

Mi rimarkis, ke dum longa vojaĝo homoj ofte rakontas al nekonatoj historion de sia vivo. Ili parolas pri siaj pripensoj, esperoj, maljustaĵoj, perditaj iluzioj...

En kupeo de l trajno veturanta al... ne estis multaj homoj. Krom mi estis ankoraŭ virino kaj du dekelkjaruloj. Unu el ili estis filino de la virino. „Darek estas mia fianĉo” – diris la nigrabarulino kun kortuŝanta rideto. „Ili lernas en la dua klaso de liceo. En la hodiaŭaj tempoj maturiĝo iras pli rapide” – kun embaraso flustris la juna patrino. Provante fari agrablan etoson, mi subtenis la interparolon demandante la gejunulojn: „Do, kio poste? Post abiturienta ekzameno?”. „Mi studos kosmonaŭtikon” – deklaris ĝoje la knabino. „Mi – armean medicinon” – ridetante al ŝi aldonis la knabo. „Ĉu la armean medicino diferencas de la klasika?” – mi demandis iom konsternita pro la manko de la propra scio. „Oni povas kuraci soldatojn dum la milito” – kun afabla rideto informis min la knabo. „Do la milito en la kosmo ekligos vin” – mi ekŝercis, tamen miaj kunparolantoj estis seriozaj. „Ili estas junaj, ankoraŭ multfoje ili ŝanĝos siajn planojn” – denove flustris la embarasita patrino. Mankis al mi la kuraĝo daŭrigi la interparolon. La patrino mallevis la kapon,



la gejunuloj rigardis unu la alian kun raviĝo kaj mi... Mia koro ekbatis tiom forte, ke ĝi superbruis la frapadon de la trajnaj radoj. Mi fermis la okulojn ŝajnigante dormeton...

Mi denove havis 20 jarojn kaj mi studis jurosciencon. La amo de mia vivo – Kamil – studis la lastan jaron de medicino. Li volis esti kirurgo. Li estis la plej bona inter plej bonaj. Li aktivis en ĉiuj eblaj sciencaj rondoj de la universitato. Ĉio imponis al mi. Ĉiujare li faris ĉiujn eblajn praktikadojn en hospitaloj eksterlande kaj instigis min al la diligenta studado.

Post la lasta ekzameno li ne volis fari specialigon. Li deklaris, ke li aliĝos al laboro en la organizaĵo Kuracistoj sen Limoj kaj ke oni akceptis lin al la plej proksima forveturo al Afriko. Oni aprobis ĉiujn liajn praktikojn kaj la laboron en hospitalo en Kabul dum la unujara paŭzo en la studado kiel nepre bezonan profesion sperton. Mi aŭdis pri la homoj, kiuj agas tiumaniere, tamen mi demandis min – Kial li? Kun koleriĝo li klarigis, ke laŭ statistiko ĉiutage ĉ. 22 miloj da personoj de la medicina personaro kaj aliaj laboras en diversaj lokoj de la mondo helpante al bezonantoj. Ili faras tion plejparte en malfacilaj, ofte danĝeraj kondiĉoj, kiuj postulas forton de la animo de la helpantoj. „Imagu, ke ekzistas internacia eksterregistara organizaĵo kreita en 1971 de grupo de francaj ĵurnalistoj kaj kuracistoj” – li diris kun fervoro. „La sidejo de la organizaĵo estas Ĝenevo. Kreis ĝin grupeto de entuziasmuloj, kiuj kredis, ke ĉiuj homoj havas la rajton al la medicina prizorgo, kaj ke ĉi tiu rajto estas pli grava ol landlimoj. Por mi ili estas la civitanoj de la mondo. La kuracistoj kaj la flegistinoj riskas sian vivon por helpi al homoj en la batalzonoj, kiujn forlasis helpantoj de aliaj organizaĵoj, ekz. Internacia Ruĝa Kruco, timante pri la propra sekureco”.

Mi silentis timigita. „Li forveturos kaj forlasos min! Li forveturos kaj pereos”. Mi volis konvinki lin preni min kun si. Li tamen ordonis al mi studi por esti utila en la estonteco. Li rakontis, ke Kuracistoj sen Limoj agas en pli ol 80 landoj gvidante pli ol 360 projektojn. Ĉiu el ili postulas kunordigon de agadoj, administradon, financadon, serĉadon kaj preparadon de la laborantaro. Li asertis, ke mi povos esti utila ankoraŭ antaŭ la fino de miaj studoj kiel volontulino en unu el 23 sendependaj organizaĵoj, kiuj gvidas humanajn kampanjojn. Li promesis kontaktigi min kun unu el ili. Li provis konsoli min dirante, ke Kuracistoj sen Limoj agas ankaŭ en Eŭropo kaj provas esti ĉie, kie regas krizo, ne nur dum militoj, sed ankaŭ en kvartaloj de mizero.





Li ektenis sian vorton. Dum adiaŭo mi ricevis belan tabuleton pri „Medicins Sans Frontiers” kun telefonnumeroj al la organizaĵo, kaj la promeson, ke post la forveturo li kontaktiĝados kun mi per skajpo el ĉiuj lokoj, kie tio eblos. Li forveturis kaj mi komencis revii pri nia venonta renkontiĝo. Komence li estis proksime, en Berlino li partoprenis 6-tagan preparkurson. Li telefonis ĉiuvespere, lia voĉo estis plena de ekscito. Mi konis lin, mi sciis, ke kien ajn li veturos, li ne kapitulacos. Mi legadis en interreto pri laboro de la kuracistoj kaj mi imagadis ĉion plej malbonan: militajn agadojn, malarion, parazitojn, varmegojn... Li ne pensis pri tio. Laŭ li faritaj vakcinadoj kaj luktovolo sufiĉos en ĉiu situacio. Al li ŝajnis, ke homo povas lerni plej multe en ekstremaj situacioj, ke tiam oni estas plej



proksime al la vera vivo. Mi konis Kamil-on, mi sciis, ke ĉie li donos sin tutan. „Dio, savu lin por mi” – mi flustris dum la lernado. Pri la longeco de la misio decidis la kuracisto mem. „Eble li ne estos kontenta kaj li revenos?” – mi revis provante parkerigi la jurajn regulojn. Mi plenumadis bone ĉiujn ekzamenojn. Ĉiam mi estis diligentulino, kiu provas – kun bona efiko – esti la plej bona studentino.

Pasis 25 monatoj de la forveturo de Kamil kaj mi plu ĉiuvespere atendis lian telefonon. Li estis en Jemeno. Ŝparante la vortojn, li rakontis, ke tie regas kaoso, en la lando regas granda humana krizo. „Epidemioj de malsanoj kaj plifortigo de bataloj akriĝis tragikan situacion. Kuracistoj sen limoj agas ĉe ambaŭ flankoj de la fronto”. „Ili estas kvazaŭ admirantoj de la ideo de Zamenhof” – li iam ekŝercis. „Ili penas helpi ankaŭ al la personoj, kiuj havas neniun medicinan protekton. Ili estas fuĝintoj, elmigrintoj, senhejmuloj, narkotikuloj kaj portantoj de la viruso HIV. Blokadoj de ŝip- kaj aerhavenoj kaŭzis, ke en la landon ne venas transportoj de nutraĵo kaj medikamentoj. Disvastiĝas epidemio de ĥolero kaj difterito, ĉar mankas hospitaloj, kuracistoj kaj medikamentoj. Pro nesufiĉa nutrado ĉiujn 10 minutojn mortas iu infano”.

Kamil revenis en Pollandon post tri jaroj. Mi ĵus plenumis finajn ekzamenojn. Lia alveno feliĉigis min. Mi traktis lian alvenon kiel premion

por tio, ke mi kredis lin kaj lian revenon. Li estis maldikiĝinta, tremadis liaj manoj... Ni ekloĝis kune, tamen por mi tio ne estis bona decido. Ĉiun nokton mi aŭdis liajn kriojn en sonĝoj, mi premadis en brakoj la forte teruritan homon. Matene li estis malĝoja, li ne sukcesis bone kondukti inter la geamikoj, li malaperadis ie por multaj horoj. Mi komencis praktikadon en juĝejo kaj mi ne povis dediĉi al li sufiĉan tempon.

Iun tagon post hejmvveno mi trovis sur la tablo karteton: „Pardonu, mi ne scipovas vivi nun ĉi tie sciante, kio okazas tie”. Li aliĝis al plua forveturo. Tiufoje li veturis al Kenjo. Li telefonis post 5 monatoj: „Neniam plu mi estos normala. Mi kuracas min pro teruraĵoj revenantaj en la sonĝoj. Jam estas pli bone. Nun mi okupiĝas pri malsatantaj infanoj. Ĉu vi scias, ke unuopa dozo de vakcino kontraŭ pneŭmokocho kostas en Pollando 250 zlotojn kaj por fariĝi imuna, estas bezonataj 3-4 dozaj? Ni ricevas ilin kiel donacojn de la produktistoj, tamen la vakcinoj ĉiam ne estas sufiĉaj. Ĉi tie mankas ĉio. Mi rigardas la mizeron, kiu ĉirkaŭas min, kaj mi benas la inventinton de Ready to Use Therapeutic Food (RUTF). Ĝi estas nutraĵo en la formo de nuksa butero. Oni povas donadi ĝin al multegaj homoj samtempe. Oni ne devas miksi ĝin kun akvo, tio malgrandigas la riskon infekti ĝin per bakterioj, kiuj troviĝas en la akvo. Krom la nuksa butero ene estas sekigita malgrasa lakto, vitaminoj kaj mineraloj. Ĉu vi povas imagi, ke tio estas ununura nutraĵo, kiun manĝas venantaj al ni infanoj? Kelkfoje mi sentas, ke tiu situacio estas por mi tro malfacila, precipe kiam la infano – malpeza kiel plumeto – mortas en miaj manoj. Mi ĉesis pensi pri la estonteco. Permesu, ke de tempo al tempo mi telefonos al vi...



Poste estis Sirio, Afganio, Sieraleono, Timoro, Ugando. La nombro de orfoj en Ugando estas unu el plej altaj en la mondo. En tiu lando 2,4 milionoj da infanoj ne havas la gepatrojn. AIDS, mult-jaraj armitaj konfliktoj kaj grandega povreco forprenis al ili la familiojn. Laborantaj tie

helpantoj portis al la loĝantaro realan helpon kaj esperon por la pli bona morgaŭo. Mi sekvis la situacion per sociaj retoj, ĉar en la gazetaro mankis



Ni do parolas pri la giganta nombro da datumoj - 44 zeta-bajtoj jare. Unu zeta-bajto egalas al unu miliardo da terabajtoj. Ne estas mirige, ke ekzistas homoj, kiuj deziras interkapti ĝian infrastrukturon per virusoj kaj ciberatakoj. Ĉiu uzanto de komputilo bone scias, ke pli facile estas preventi ol poste savi jam infektitajn maŝinojn.

Tiukaze, bedaŭrinde, oni devas entrepreni tre komplikajn informadikajn operaciojn aŭ tutsimple fizike detruai difektitan datumportilon. Malgraŭ tio, ke potencialaj atakoj de diversaj industriaj retoj estas eblaj, ili ne koncernas tro multajn homojn.

Tamen, ekzistas sistemo, kiu estas uzata de ĉiu retuzanto. Ĝi nomiĝas DNS-sistemo. Ĉiukaze, kiam ni enskribas en ret-serĉilon la nomon de iu retaĵo DNS, ni ligas nomojn kun unikaj numeroj, t. n. IP-adresoj. Dank'al tio, ni povas enskribi konkretan nomon anstatataŭ vicon de ciferoj.

La firmaoj, kiuj okupiĝas pri nomserviloj, (DNS-serviloj), posedas preskaŭ tutan kolekton de IP-adresoj kun konvenaj nomoj. Ni do havas kameraojn, aŭ eĉ kafpotojn, konektitajn al la reto kaj ĉiu tia ilo devas posedi propran unikan numeron.

La nombro de unikaj numeroj kreskas kaj ankaŭ kreskas la nombro de t. n. bot-programoj, kiuj povas fortigi t. n. bot-armeon, t. e. aparataron, uzatan de komputilpiratoj. Pere de tiuj aranĝaĵoj, piratoj povas sendi ajnan nombron de retmesaĝoj al difinita servilo, kiu tiukaze povas malfunkcii.

Tamen, multe pli danĝera povus esti senpera atako de DNS-servilo, ĉar kaze de enskribo de ĉiu nomo, la uzanto trovus neniun adreson. Tia situacio povus alkonduki al paralizo de pluraj retservoj kaj ankaŭ de multaj aparatoj, uzataj de ni ĉiutage.

Tiumomente aperas la menciitaj 7 homoj, posedantaj 7 ŝlosilojn (diversformajn), kiuj personoj scipovas fini ekestintan kaoson. Fakte ĉi homoj povas rekonstrui la perditan infrastrukturon de la DNS-reto. La uzo de la ŝlosiloj restartas la reton kaj ŝargas ĝin per datumoj, kiujn oni konservas sur speciala listo.

La listo estas dividita je du partoj, kiuj troviĝas en du apartaj lokoj. La distancoj inter ambaŭ lokoj de konservado de datumoj egalas al 4000 kilometroj. La troviĝantaj tie serviloj estas tre diligente gardataj diversmaniere.

La ŝlosilojn kreis ICANN-organizaĵo, kiu tre modeste konfesas, ke ĝia rolo tute ne estas tiel grava, kaj amaskomunikiloj troigas. Kiam la sekvan fojon vi enskribos en retservilon laŭvican nomon, ekpensu, kiom multe da operacioj ĉi-momente vi ĵus ekfunkciigis.





Kara Redakcio, traleginte interesan tekston "Pri Esperanto en la 1-a programo de Pola Radio", verkitan de Paweł Dzienis, mi eksciis pri la **memorbriko pri Odo Bujwid** (eminenta bakteriologo, gvidanto de krakova E-societo kaj prezidanto de LKK, dum la 8-a UK, okazinta en 1912 en Krakovo, pri kiu oni mencias en la filmo <https://bit.ly/3gjRSH6>) kaj **pria edzino Kazimiera Bujwid**, kiuj kontribuis al renovigo de la reĝa kastelo Wawel. Mi prifotis la memorbrikon, enmasonitan en la kastela muro, kaj mi instigas vin trovi ĝin, vizitante la kastelon. En Krakovo vizitindas ankaŭ la muzeo de Odo kaj Kazimiera Bujwid, kiu situas ĉe la strato Lubicz 34.

Kun amikaj salutoj, *Adam Wilkus*



*Adam Wilkus, Ni estu singardaj!*

Kun intereso mi tralegis tekstojn, en PE 2/2020, pri la tutmonda epidemio kaj ĝia efiko sur niajn vivojn. Tamen, ege surprizis min la artikolo „*Viruso Covid-19 en nia lando*”. Miaopinie ne estas senco kopii ĉiun informon, trovitan en la interreto, kaj senkritike publikigi ĝin en la tutlanda gazeto. Speciale pri tiel gravaj aferoj, kiel la pandemio. Kial? Ĉar en la interreto oni povas skribi ion ajn, kaj faktojn kaj malveraĵojn, kaj saĝajn pensojn kaj stultaĵojn. Oni bone scias, ke lastatempe aperas multaj mensogoj en amaskomunikiloj kaj ofte iu publikas informon nepruvitan aŭ simple malveran. Do, mi petas ĉiujn, ni kontrolu pravecon de ĉiu informo,

prefere en diversaj fontoj, kaj du foje pripensu, antaŭ ol publikigi ĝin aŭ dissendi per retroŝto.

Precipe surprizis min la sugesto, ke ne estas senco uzi maskojn por protekti kontraŭ la viruso. La maskoj ne estas la mirakla rimedo por spiraj malsanoj, sed ili povas helpi kaj vere helpas limigi disvastigon de la infekto.

Legante kontraŭstarajn informojn, homoj foje sentas sin perditaj. La aŭtoro de la menciita artikolo priskribis tion jene: *Al kiu ni devas kredi? Laŭ logiko, ni devus kredi al la registaro, sed...* Nu, permesu al mi demandi kial „sed”? Sendepende de via opinio pri la ŝtatestro, sciindas, ke ĉiam pli bona estas la estro, kiu faras la necesajn decidojn, eĉ se iuj postulas pli postan korekton, ol la estro, kiu ne faras iujn ajn decidojn. Tiu konkludo ŝajne estas bone konata por ĉiuj, kiuj estras firmaon aŭ alian grupon de multaj homoj. Kaj, miaopinie, ĝi validas ĝuste nun, dum la kriza situacio. Laŭ mi, la ĝustan sintenon prezentis la aŭtoro de alia teksto *„Ne ekzistas malbono, kiu ne kaŭzas la bonon”*: (...) *Homoj estas devigataj, laŭ la ordonoj de registaroj, ŝanĝi siajn kutimojn. Tio signifas, ke ili devas ĉefe resti hejme kaj vivi iom izolite. Iuj homoj akceptas tion kaj aliaj ne, sed saĝaj homoj scias, ke tiel oni devas konduki*”. Mi pensas, ke simile estas pri maskoj.

En diversaj landoj estas adoptitaj malsamaj strategioj, ĉar diversaj spertuloj esprimis malsamajn opiniojn. Ekzemple en Svedio kaj Britio, oni komence adoptis strategion, ke la tuta socio unue devas malsaniĝi, por akiri sian imunecon, kaj oni permesis amasiĝojn. La strategio fiaskis kaj multaj maljunuloj, kompare kun aliaj landoj, mortis tie rapide. En Pollando, la deviga izoligo estis enkondukita relative rapide post la unua konfirmita infekto, kio certe savis multajn vivojn. Tamen, ekzemple en Slovakio oni ordonis pli striktan reĝimon, kun deviga kvaranteno en centroj de izoligo, por trapasantojn de landlimoj, kaj ankaŭ frue devigis homojn porti maskojn. Rezulte de tio, en tiu lando, multe malpli da homoj malsaniĝis kaj mortis. Vizitindas la tutmonda mapo kun la informo pri la infektitoj, mortintoj, saniĝintoj, (nombro kaj kazoj po unu miliono), kie oni povas kompari la situacion en diversaj landoj: <https://www.google.com/covid19-map>

Inter miaj gekonatoj estas kuracistino, kiu, ekde komenco de la pandemio en nia lando, zorgas pri infektitoj en malsanulejo, provante helpi al ili saniĝi. Ŝi petis min kaj geamikojn strikte sekvi la rekomendojn de la Ministerio pri Sano kaj de la Ĝenerala Sanitara Inspektisto kaj petis disvastigi inter gekonatoj la leteron de kuracistoj, flegistoj kaj paramedikistoj el la tuta Pollando, kies tradukon mi publikigis ĉe la retpaĝo: <https://tiny.pl/7c9pz>.



Dum la eksterordinara situacio, homoj devas ŝanĝi siajn kutimojn, kio – paradokse - havas ankaŭ pozitivajn efikojn. Tion trafte priksribas la jena ŝerco pri pandemio: „Teruraj tempoj venis! Homoj devas lavi siajn manojn, kuiri manĝojn, paroli kun infanoj. Se ĉi tio daŭros, oni komencos legi librojn.” Vi povas legi aŭ rigardi aliajn ŝercojn, inter alie pri la pandemio, en la fejsbuka grupo „Ŝerco”.



PS

*Artikolo en PE 2 pri pandemio estas intence provoka kaj ne estis skribita senkritike. Bedaŭrinde, multaj situacioj, priskribitaj en ĝi estis veraj kaj per ĝi, mi volis, iom sarkasme, prezenti kontraŭstarajn informojn kaj agojn. Laŭ mi, decidpovaj personoj en estraro, precipe en tiu malfacila situacio, devas havi modelan kaj eĉ ekzemplan sintenon kaj konduton. Redaktoro*



**Przemysław Wierzbowski, Germana ĵurnalisto en Bjalistoko**



La 2-an de julio 2020, en Bjalistoko gastis Florian Kellermann – ĵurnalisto de la germana radio Deutschlandfunk, kiu kolektis materialojn pri la spuroj de multkultureco en nia urbo. Li renkontiĝis kun mi kaj Nina Pietuchowska en la sidejo de Bjalistoka Esperanto-Societo, kie ni longe parolis, ĉefe pri Esperanto: ĝiaj historio kaj estonteco, la nuna stato de la movado je diversaj niveloj, kunlaborado kun la urbo, niaj projektoj kaj la ĝenerala opinio pri la lingvo kaj ĝia kreinto L. Zamenhof. S-ro Kellermann aparte interesiĝis pri la demando, ĉu en la 21-a jarcento Bjalistoko estas vere multkultura

urbo, kian oni ofte prezentas al turistoj. Mia respondo estis nea. La ĵurnalisto bazis sian viziton sur informoj el la libro „Bjalistoko. Blanka forto, nigra memoro” de Marcin Kački. La libro siatempe estis tre pridiskutata en la urbo.

Pro tio la aŭtoro gastis ankaŭ en Esperanto-Libraro, kie li parolis kun Elżbieta Karczewska, kiu estis menciita en la libro. La ceterajn tagojn la germana ĵurnalisto dediĉis al renkontiĝoj kun bjalistokaj sociologoj, historiistoj kaj sociaj aktivuloj.



Estimataj, Ni invitas Vin partopreni en la **32-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo**, kiuj okazos **ekde 11-a ĝis 13-a de septembro 2020** (vendrede - dimanĉe).

Ĝi estas tradicia aranĝo de esperantistaro kun abunda prelega kaj arta programoj, kiu, okazas en la iama reĝa ĉefurbo de Pollando.

La E-Tagojn de Krakovo organizas Krakova Societo ESPERANTO en la Kulturcentro de Podgórze, strato Sokolska 13, PL-30-510 Kraków, Pollando (<http://www.centrumkultury.eu>).

Kontakto al organizanto: [kse.krakovo@gmail.com](mailto:kse.krakovo@gmail.com)

Reta aliĝilo: <http://www.kse.cba.pl/aligxilo/>

Tranoktebleco: <http://www.kse.cba.pl/tranoktebleco/>

Provizora programo: <http://www.kse.cba.pl/etagoj/>

Krakova Societo ESPERANTO

## Kalendaro

### Popularaj Esperanto-aranĝoj en Pollando en 2020

Forstrekitaj aranĝoj estis planataj, sed pro la pandemio ne povis okazi aŭ okazos alitempe

|                   |   |  |
|-------------------|---|--|
| 23-28.<br>05.2020 | <b>5-a Interkultura Majrendevuo</b><br>Wrocław / Dolina Baryczy   | Eŭropa Centro de Multkultura Edukado<br>en Wrocław, <a href="mailto:informado.eo@gmail.com">informado.eo@gmail.com</a> |
| 23-24.<br>05 2020 | <b>8-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj</b><br><b>Kantoj en Wrocław</b><br>Okazos oktobre en virtuala formo | Eŭropa Centro de Multkultura Edukado<br>en Wrocław, <a href="mailto:informado.eo@gmail.com">informado.eo@gmail.com</a> |

|                        |   |   |
|------------------------|---|---|
| 23.5.<br>2020          | 5-a Internacia Simpozio, Wrocław  | Eŭropa Centro de Multkultura Edukado<br>en Wrocław, informado.eo@gmail.com  |
| 21.06.<br>2020 ?       | Montara Renkonto Czantoria Wielka<br>en Beskidy Montaro   | suchanekj@seznam.cz   |
| 29.5 –<br>5.6.<br>2020 | Germana Pola Esperanto Kongreso<br>Fervoista Esperanto Kongreso<br>Frankfurt (O)/ Slubice<br>Okazos en 2021 | Pola Esperanto-Asocio<br>Germana Esperanto-Asocio<br>Internacia Fervoista Esperanto Federacio   |
| 25.07-1.<br>08.2020    | 93-a kongreso de Sennacieca<br>Asocio Tutmonda en Bjalistoka<br>Okazos en 2021                              | Sennacieca Asocio Tutmonda kaj Bjalistoka<br>Esperanto-Societo  |
| 16.08.<br>2020         | Montara Esperanta ekskurso al la<br>monto Szyndzielnia kaj urbo Szczyrk<br>apud Bielsko-Biala               | Filio de Pola Esperanto-Asocio<br>en Bielsko-Biala. Krystyna Zgud<br>karad099@gmail.com   |
| 8-18.08.<br>2020       | Kristana Kongreso en Legnica<br>(kadre de 70-a KELI kongreso)<br>Okazos en 2021                             | Silezia Esperanto-Asocio.<br>Kristana Esperantista Ligo Internacia<br><a href="https://keli.sea-vroc.eu/">https://keli.sea-vroc.eu/</a>   |
| 9-19.08.<br>2020       | “Esperanto, maro kaj muziko”<br>-amuza kaj ripoza feriado<br>en Ustronie Morskie                            | Silezia Esperanto-Asocio.<br>Teresa Pomorska, pomer@wp.pl   |
| 2-10.<br>09.2020       | 53-a Internacia Esperantista-Feriado<br>en Łądek Zdrój  | Silezia Esperanto-Asocio<br>Teresa Pomorska, pomer@wp.pl  |
| 5.09.2020<br>15:00     | Nacia legado en Esperanto<br>„Balladyna” de Juliusz Słowacki  | Esperanto-libraro, Podlaha Libraro,<br>Ludoviko Zamenhof Centro, Bjalistoka<br>Esperanta Societo,<br>kontakt@espero.bialystok.pl  |
| 11-13<br>09.2020       | Esperantaj Tagoj de Krakovo   | Krakova Societo Esperanto<br>kse.krakovo@gmail.com  |
| 11-13.<br>09.2020      | “Esperanto sur Strando” en Sopot  | Triurba Esperantista Asocio TORENTO<br>torentosopot@wp.pl<br><a href="https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/">https://sites.google.com/site/esperantowsopocie/</a><br>FB – Esperanto Sopot.pl |
| 18-20.<br>09. 2020     | 36-aj Artaj Konfrontoj en Esperanto<br>„Arkones 2020” en Poznań   | E-SENCO Kultur-Socia Societo je la nomo<br>Ludoviko Zamenhof en Poznań.<br><a href="http://www.arkones.org/eo/">http://www.arkones.org/eo/</a>  |
| 25.10.<br>2020         | Johano Paulo la 2-a - Esperantisto  | Bjalistoka Esperanta Societo<br>kontakt@espero.bialystok.pl   |



|                    |  |  |
|--------------------|--|--|
| 9-11.<br>10.2020   | 44-aj Esperantistaj Preĝtagoj<br>en Częstochowa                | Pola sekcio de IKUE<br>pomer@wp.pl   |
| 11.2020            | Esperantista renkontiĝo<br>GRUPE - 24 en Gliwice               | PEA, filio en Gliwice,<br>stanislaw.mandrak@gmail.com<br>aŭ: staman@ka.onet.pl             |
| 5-6.<br>12.2020    | 5-a Esperanta konkurso "Vortbeleco<br>en Esperanto" en Wrocław | Eŭropa Centro de Interkultura Edukado /<br>informado.eo@gmail.com / Małgosia<br>Komarnicka |
| 11-13.<br>12. 2020 | 21-aj Bjalistokaj<br>Zamenhof-Tagoj en Bjalistoko              | Bjalistoka Esperanta Societo<br>kontakt@espero.bialystok.pl                                |
| 12.-01<br>2020     | 12-a JES Junulara Esperanta<br>Semajno en ...                  | Pola Esperanto-Junularo<br>www.pej.pl  |

## Universalaj Kongresoj de UEA

|                   |  |  |
|-------------------|--|--|
| 1-8.08.<br>2020.  | <del>La 105-a Universala Kongreso de<br/>Esperanto (UK) en Montrealo (Kanado).</del><br>En 2020 nu rokzos virtuala kongreso<br>UK en tradicia formo okazos en 2022 | Universala Esperanto-Asocio<br>uea.org |
| 17-24.07.<br>2021 | La 106-a Universala Kongreso de<br>Esperanto (UK) en Belfasto (Nord-Irlando)<br>Okazos en 2021   | Universala Esperanto-Asocio<br>uea.org |

## Gazetaro pri Esperanto-movado

La retejo <https://www.wiatrak.nl/> la 28-an de aprilo prezentis artikolon pri Esperanto kaj L. Zamenhof "Ludwik Zamenhof i Esperanto bardziej znany w Holandii niż w Polsce" ("Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto estas pli bone konataj en Nederlando ol en Pollando"). La retejo devenas el Nederlando kaj pollingve priskribas diversajn temojn ĉefe kunligitajn kun Nederlando. Alia retejo [www.kalbi.pl](http://www.kalbi.pl) rememorigas pri Tago de Zamenhof kiu kutime okazas la 15-an de decembro.




## Oni eldonis

*Przemysław Wierzbowski*

### „Baladina” – Bjalistoko eldonas la dramon de J. Słowacki

La Nacia Legado estas iniciativo de la prezidento de Pollando, kiu elektas verkon el la pola literaturo, legota la unuan sabaton de septembro tutlande; en bibliotekoj, asocioj, fare de famuloj, en televido k. s. Bjalistoka Esperanto-Societo partoprenas en la evento de pluraj jaroj, eldonante la verkojn en Esperanto-traduko. Al ili apartenas, inter alie: „La Pupo” de Bolesław Prus, „Antaŭprintempo” de Stefan Żeromski kaj reldono de „Quo Vadis” de Henryk Sienkiewicz.

Nian iniciativon volonte subtenis esperantistoj el la tuta mondo, al kiuj ni sendis la tekstojn – multas artikoloj kaj registraĵoj, en kiuj oni legas polan literaturon en la internacia lingvo, pri kio vaste raportis novaĵservoj de pluraj landoj.



Por 2020 estis elektita „Balladyna” de Juliusz Słowacki. La kvinakta, romantikisma dramo estis verkita en 1834, en Ĝenevo. Ĝiaj ĉefaj temoj estas la avideco je regado kaj maturiĝanta krimemo. La titolo estas la nomo de la heroino, ne senkiale rilatanta al balado, en kiu aperas fantastaj motivoj kaj popola folkloro.

Al kelkaj Esperanto-tradukoj el la verkaro de J. Słowacki (la plej konataj de Grabowski, inter alie, „Mazepa”, „En Svisujo” kaj „Patro de pestuloj”) aliĝos „Balladyna”, esperantigita de Lidia Ligęza. Ni invitas ĉiujn al Centro Ludoviko Zamenhof en Bjalistoko, kie la 5-an de septembro 2020, je la 15-a horo ni rakontos pri la aŭtoro, prezentos la libron, legos ĝiajn fragmentojn kaj renkontiĝos kun la tradukintino.

Esperanto-kluboj, kiuj ŝatus ricevi ekzempleron de la libro, por legi ĝin en tiu tago, povas kontakti nin per kontakt@espero.bialystok.pl. Estus bone registri la eventon. La eldonon finance subtenis la urbo Bjalistoko.:

## Forpasis

Ni profunde bedaŭras informi vin, ke la 30-an de aprilo 2020, en Varsovio, mortis la lodza esperantistino **Marta Rak-Podgórska**. La 13-an de majo 2020, je la 13:00, okazis la funebraĵoj en la preĝejo al St. Karol Boromeusz, sur la tombejo *Stare Powązki*, post kiu ŝi estis kondukita al la loka tombejo al la familia tombo. (katolika parto de la tombejo)

Robert Kamiński, PEA Filio en Łódź

La 4-an de majo 2020 en Sopot, forpasis esperantistino **Gizela Lange**.

La adiaŭa ceremonio okazis la 7-an de majo 2020, en la preĝejo *Serca Jezusowego* kaj entombigo sur la tombejo *Komunalny* en Sopot.

Kun la granda malĝojo - samklubanino, Jagoda Greger





*Andrzej Sochacki*

## Vintra Studenta Esperanto-Lernejo

Vintra Esperanto-Lernejo okazis en Krynica Górská 12-20 de februaro 1989.

Temo de la studenta renkontiĝo estis "Psikologio de decidoj". La ĉefan temon prezentis Barbara Rokicka kaj Irena Makowska.

Dum la semajno, oni povis partopreni en la riĉa, amuza kaj eduka programo:

Nacia vespero, danc-kurso, komuna kantado kun Mirosław Ćwiek kaj Mariusz Żak

Prelegoj: "Psikologio de decidoj" - Barbara Rokicka kaj Irena Makowska. Interlingvistiko - Ryszard Rokicki, Decidaj ludoj Modest Błasiak, Provo de aĝustigo de decida analizo al ordinaraĵaj imagoj en la procezo de decidado - Irena Makowska, nekonvenaj metodoj de kuracado - Barbara Rokicka, prelego pri UEA - Janusz Błaszczyc, Studenta Scienca Esperanto-Movado, Jacek Plis.

Kursoj: biblia kurso Mariusz Żak, lingvaj kursoj por komencantoj kaj progresintoj.

Okazis ankaŭ kunsido de Estraro de Pola Studenta Esperanto-Komitato,

Krome, en la aranĝo partoprenis i.a. Adam Colewiński, la lasta prezidanto de PSEK, Bożena Traczyk kaj Beata Traczyk, Lidia Siemińska, Jarosław Siemiński, Leszek Janczura, Barbara Błasiak, Beata Machowska, Przemysław Domini-czak.

Raportis kaj  
fotis Andrzej Socha-  
cki



Vintra Esperanto-Lernejo, Krynica Górská 12-20, feb. 1989. Foto A. Sochacki



Barbara Rokicka  
prelegas pri  
nekonvenaj  
metodoj de  
kuracado



Kuna kantado



Lingva kurso



Vintra Esperanto-Lernejo, Krynica Górska 12-20, feb. 1989 Foto A. Sochacki

Modest Błasiak kun  
Jarosław Parzyszek  
kaj Adam  
Colewiński



Vintra Esperanto-Lernejo, Krynica Górska 12-20, feb. 1989 Foto A. Sochacki


Promenado tra  
Krynica Górska



Vintra Esperanto-Lernejo, Krynica Górska 12-20, feb. 1989 Foto A. Sochacki

Andrzej Sochacki  
kun Modest Błasiak

## Birda krucenigmo



**1.** La birdo, kiu havas spektakle rimarkindan plumaron. Ties tre longaj kaj rigidaj vostoplumoj estas dekorataj per metalecaj okulmakuloj (diverskoloraj koncentraj rondoj). La ĉapeto de popole vestita krakovano estas dekorita per longa plumo de tiu birdo.

**2.** Fluganta malrapide svelta kaj alta birdo, profunde batanta siajn flugilojn, kun kolo sur la dorso dumfluge faldita en la formo de litero S. Ĝi ĉasas fiŝojn ofte starante sur unu kruro.

**3.** Onidire la birdo kunportas bebojn kaj feliĉon al la domo, sur kies tegmeno ĝi konstruis sian neston.

**4.** La birdo - simbolo de paco.

**5.** Laŭ proverbo Unu ..... printempon ne alportas.

**6.** La rabobirdo, kiu ĉasante musojn aŭ aliajn vertebrulojn, flugas senbrue dank al la mola plumaro. Ĝi havas flekseblan kolon, kiu ebligas al ĝi turniĝi sian kapon (kun grandaj okuloj kaj hokita beko) je 270 gradoj ĉirkaŭen.

**7.** Tre socia birdo, kiu loĝas en grandaj kolonioj en varmaj landoj, foje kun miloj da birdoj en vivejoj, kie estas abunda manĝo. La birdo ofte staras sur unu kruro. Ĝi estas plej bone konata pro sia moviĝado, kiu similas al samnoma danco.

**8.** La sola reprodukta parazito en Centra Eŭropo, kiu ĵetas sian ovon en la nestojn de aliaj birdoj; ĝi estas tre utila ĉar volonte formanĝas harplenajn raŭpojn, preteratentitajn de aliaj birdoj. La nomo venas de la voko de ĉi tiu birdo.

9. La akvobirdo kun longa beko, kiu en mezepoko estis simbolo de Kristo, ĉar oni kredis, ke dum la tempo de malsato, ĝi nutras siajn idojn per sia propra sango.

10. La imperiestra ..... , kiu vivas en Antarkido, scipovas subakviĝi plej profunde en la birda mondo kutime ĝis 200 metroj sub la akvo (la rekordo estis 565m).

11. La esprimo : Nigra ..... estas komprenata kiel malofta kaj neantaŭvidebla okazaĵo, kiu havas grandegan efikon al realeco. Uzata rilate al multaj sferoj de vivo, ekonomio kaj komerco. Ĝi rilatas al la fakto, ke dum jarcentoj homoj estis konvinkitaj, ke ekzistas nur blankaj individuoj de ĉi tiu specio, kaj nur post la malkovro de Aŭstralio oni trovis ankaŭ la nigrajn. Se ĝis nun ni vidis nur la blankan kaj eĉ ne unu nigran, tio ne signifas, ke la nigra ne ekzistas. Estas granda minaco kredi, ke ni havas ĉion sub kontrolo kaj ignori tion, kion ni ne povas antaŭvidi (pro kio la risko multe plialtiĝas).

11. La esprimo : Nigra ..... estas komprenata kiel malofta kaj neantaŭvidebla okazaĵo, kiu havas grandegan efikon al realeco. Uzata rilate al multaj sferoj de vivo, ekonomio kaj komerco. Ĝi rilatas al la fakto, ke dum jarcentoj homoj estis konvinkitaj, ke ekzistas nur blankaj individuoj de ĉi tiu specio, kaj nur post la malkovro de Aŭstralio oni trovis ankaŭ la nigrajn. Se ĝis nun ni vidis nur la blankan kaj eĉ ne unu nigran, tio ne signifas, ke la nigra ne ekzistas. Estas granda minaco kredi, ke ni havas ĉion sub kontrolo kaj ignori tion, kion ni ne povas antaŭvidi (pro kio la risko multe plialtiĝas).

12. La plej malgranda birdo en la mondo, kiu povas flosi vertikale, flugi flanken kaj malantaŭen dum kolektado de nektaro el floroj. La koro de la birdeto povas bati ĝis 1260 batoj per minuto kaj ĝin karakterizas tre rapida metabolo (iuj specioj devas manĝi ĉiutage du foje pli ol ili pezas).

13. La kuracisto de arboj, kiu printempe ofte ludas perkusion en arbaro.


14. La birda simbolo de sankta Johano (unu el kvar evangelistoj) en arto. Ankaŭ la reĝo de birdoj.

15. La migra ..... estas la plej rapida birdo en la mondo. Oni mezuris, ke ĝi povas flugi kun rapideco 400 kilometroj per horo. La birdo vivas en ĉiuj kontinentoj krom Antarktido.

16. Laŭ la pola proverbo iu ekveturas same kiel tiu birdo malantaŭ la maron ĉar la birdo faras provizojn aŭtune kiel antaŭ longa vojaĝo sed fakte restas hejme. En la plumaro de la birdo estas karakterizaj elementoj: Ĉe la flugiloj estas tre rimarkinda helblua parto kun etaj nigraj strekoj. Kaj ĉe la beko kaj subokule ĝi havas nigran larĝan strion kvazaŭ lipharon.

17. La birda dio laŭ kredoj de antikvaj Egiptoj.

18. La plej granda birdo en la mondo, kies enverguro estas ĝis



350cm (la rekordo estis 370cm). Ĝi scipovas ŝvebi en la aero super la maro sen iu ajn frapo de flugilo dum kvar horoj.

19. Granda nigra akvobirdo, manĝanta fiŝojn, antaŭe vaste uzata en Azio por fiŝkaptado. Post subakviĝo, ĝiaj plumoj trempas akvon ĉar, male al anasoj aŭ cignoj, ĝi ne havas uropigan glandon ĉe la vosto, kiu produktas akvorezistan oleon kaj tial post ĉasado en la akvo ĝi ofte sidas kun etenditaj flugiloj sekigante ilin en vento kaj suno (ĉar malsekaj plumoj faras la birdon tro peza por flugi efike, kaj ankaŭ signife malvarmigas ĝian korpon).

Verkis: Adam Wilkus



**ENFERMITA HOMO MANĜAS KIEL PANDO. DE TIE DEVENAS LA NOMO "PANDEMIO".**



Pola Retradio en Esperanto  
pola-retradio.org



### Mesaĝo de kuraĝo kaj espero

En la mondon venis nova evento: la **Monda Festivalo de Esperanto** aŭ **MondaFest' 2020** estas respondo de la Esperanto-komunumo al la zorgiga kaj pensiga momento travivata de la socio: ĝi estas nia komuna mesaĝo de kuraĝo kaj espero al la tuta homaro kaj havas kiel ĉefan temon **"UN 75-jara: Dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiganta mondo"**.

La Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest' 2020) estas realigo de **Universala Esperanto-Asocio** kune kun **E@I** kaj **Vinilkosmo**, oficiale subvenciata de **ESF**. Ĝi okazos **inter la 20-a de junio kaj la 20-a de septembro** 2020, kaj en ĝia kadro okazos la **Virtuala Kongreso de Esperanto (VK)**, de la **1-a ĝis la 8-a de aŭgusto** 2020.

La bezono nuligi la 105-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu estus la plej grava Esperanto-evento de la jaro, planita por okazi en Montrealo, surprizis kaj ŝokis preskaŭ ĉiujn esperantistojn. MondaFest' 2020 kaj la VK estas nia aktiva maniero kontraŭagi ĉian ajn senesperigan ombron de la pandemio, per ampleksa invito al la monda E-komunumo konstrui ion novan kune. Tiu invito celas ĉiujn esperantistojn, inkluzive tiujn, kiuj neniam havis la okazon partopreni UK-on. Tiu okazo estu la grundo, de kiu ni kolektive ĝermigos nian bezonatan **mesaĝon de kuraĝo kaj espero al la mondo**. Ĝi esperinde fariĝos parto de nia praktiko ankaŭ por la post-pandemia epoko. Tiam, ni, esperantistoj, kiuj kuraĝis kaj esperis, povos kunĝui la 106-an UK en Belfasto, 2021, kaj la 107-an UK en Montrealo, 2022, rikoltinte la fruktojn de la Monda Festivalo de Esperanto.

Ĉiu evento kadre de MondaFest' 2020 havos siajn regulojn pri partopreno. Al kelkaj eblos publike aliri, por kelkaj aliaj necesos formale aliĝi. Kontrolu ĉe ĉiu evento la koncernajn regulojn. Vi estas bonvena donaci kaj subvencii la agadojn ĉirkaŭ la Festivalo kaj helpi **konstrui novan historion, marki novan epokon**.



**MONDAFEST' 2020**  
LA MONDA FESTIVALO DE ESPERANTO  
20 JUNIO - 20 SEPTEMBRO



# NIA FOTOGALERIO



„Ĝardena” esperantista movado en PEA-filio en Szczecin

Ĉu vi aŭskultas elsendojn de Varsovia Vento - [www.podkasto.net?](http://www.podkasto.net?)